UNESKO

# Kuriero

Oktobro-Decembro 2020




## 50-Jariĝo de la Lukto Kontraŭ Ŝakrado de Kulturaĵoj

- La **itinero** de ŝtelita **steleo**: Christos Tsirogiannis
- **Sociaj retejoj:** La nova Eldorado por fikomercistoj: Tom Mashberg
- **Ĉinaj** bronzaĵoj el la tuta mondo kunvenas en **virtuala muzeo**: Tang Jigen
- En **Nederlando la muzeoj** alfrontas la kolonian pasintecon de la lando: Catherine Hickley
- **Argentino,** ĉampiono je **restituoj**: Irene Hartmann

ISSN 2096-9082

UNESCO
United Nations
Educational, Scientific and
Cultural Organization

EL POPOLA ĈINIO
www.espero.com.cn

## Abonu la presitan version

1 jaro (4 numeroj): 27€

2 jaroj (8 numeroj): 54€

Afranko: 8 eŭroj (1 numero)

Por ricevi detalajn informojn kontaktu:
lamondo@163.com

## Abonu la bitversion

**Ĝi etas 100% SENPAGA**

**http://www.espero.com.cn/; http://esperanto.china.org.cn/; https://en.unesco.org/courier/subscribe**

## Sekvu la lastajn novaĵojn de Kuriero

@unescocourier

Facebook Twitter Instagram

## Legu kaj disvastigu

Disvastigu kaj reklamu *UNESKO-Kurieron* laŭ Libera Aliro [Open Access], laŭ reguloj de UNESKO por publikaĵoj.


**2020 •n-ro 3 • Eldonata ekde 1948**

*UNESKO-Kuriero* estas eldonata kvarfoje jare, danke al la grandanima apogo de Ĉina Popola Respubliko, de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj  Kulturo (UNESKO). Ĝi antaŭenigas la idealojn de UNESKO, diskonigante ideojn pri inter nacie gravaj temoj, konforme al sia mandato.

**Direktoro:** Matthieu Guével
**Ĉefredaktoro intertempa:** Agnès Bardon
**Asista redaktoro:** Katerina Markelova
**Sekcia redaktoro:** Chen Xiaorong
**Redaktoroj pri lingvoj:**
**Angla:** Shiraz Sidhva
**Araba:** Fathi Ben Haj Yahia
**Ĉina:** Sun Min kaj Ĉina Tradukejo kaj Eldonejo
**Franca:** Christine Herme, provlegado
**Hispana:** William Navarrete
**Rusa:** Marina Yartseva
**Cifereca redaktoro:** Mila Ibrahimova
**Fotoj kaj ilustraĵoj:** Danica Bijeljac
**Tradukoj kaj enpaĝiga kunordigado:**
Marie-Thérèse Vidiani
**Administracia kaj redakcia asistanto:**
Carolina Rollán Ortega

**Produktado kaj antaŭenigo:**
Ian Denison, Estro pri publikigado kaj var-markada antaŭenigo de UNESKO
Eric Frogé, Ĉefa asistanto produktada
**Cifereca redaktoro:**
Denis Pitzalis, Reteja arĥitekto/projektanto
**Amaskomunikilaraj Rilatoj:**
Laëtitia Kaci
**Fasonado:**
Jacqueline Gensollen-Bloch
**Kovrila bildo:** © UNESCO/courtesy of ArnulfoGráfico
**Piktogramo:** © icon Stocker/veronawinner/ Shutterstock
**Internuloj:**
Lei Runzhou, Li Yihong (Ĉinio)
**Kuneldonaj redaktoroj:**
**Esperanto:** Chen Ji
**Kataluna:** Jean-Michel Armengol
**Korea:** Soon Mi Kim
**Portugala:** Ivan Sousa Rocha

**Informo kaj Kopirajtoj:**
courier@unesco. org
7, place de Fontenoy, 75352 Paris 07 SP, France.



© UNESCO 2020

Periodaĵo, alirebla en Libera Aliro (Open Access) sub la licenco *Attribution ShareAlike 3.0 IGO* (CC BY SA3.0 IGO) (http://creativecommons.org/licenses/ by-sa/3.0/igo/). Uzante la enhavon de ĉi tiu eldonaĵo, la uzantoj devas observi la priuzajn kondiĉojn de UNESKO-Deponejo de Libera Aliro (Open Access Repository) (http://en.unesco.org/ open-access/). La supra licenco koncernas ekskluzive la tekstojn. Por uzi la bildojn, oni devas peti permeson. La indikoj, uzitaj en tiu ĉi eldonaĵo, kaj la prezento de la donitaĵoj ne implicas esprimon de ia ajn opinio de flanke de iu ajn lando de UNESKO koncerne la leĝan staton de iu ajn lando, teritorio, urbo aŭ sfero de ties regado aŭ koncerne markadon de landlimoj. La artikoloj esprimas la opiniojn de la aŭtoroj, ne nepre reprezentas la opiniojn de UNESKO, kiu ne respondecas pri ili.

**Malgarantio:** UNESKO ne garantias la konformon de la Esperanto-eldonaĵo al la originala numero en la ses oficialaj lingvoj de la Organizo.



**La bitversio haveblas senpage ĉe**
http://www.espero.com.cn/
http://esperanto.china.org.cn/
http://uea.org/revuoj/unesko_kuriero

**Supera organizo:** Ĉina Internacia Eldona Grupo
**Subtena organizo:** Universala Esperanto-Asocio
**Eldono:** El Popola Ĉinio
**Direktoro:** Chen Shi
**Ĉefredaktoro:** Zhao Jun
**Aganta ĉefredaktoro:** Chen Ji
**Tradukantaro:** El Popola Ĉinio kaj UEA-Teamo
**Provlegantoj:** Chen Ji, Mao Zifu, Rafael Henrique Zerbetto kaj José Antonio del Barrio
Presita en Pekino kaj Parizo
Presita de Limigita Kompanio Yincheng- Beichuang en Pekino

**Adr:** P.O. Kesto 77, Beijing CN-100037, Ĉinio
**Tel:** +86-10-68996130
+86-10-68996590

**Retpoŝto:** lamondo@163.com
CN 10 - 1711/C    ISSN 2096 - 9082
**Prezo:** 6.8 eŭroj

# Enhavo


## LARĜA ANGULO
## 50-jariĝo de la lukto kontraŭ ŝakrado de kulturaĵoj 4

**Ŝakristoj de artaĵoj: Ŝtelistoj de la animo de la popoloj** ....... 5
Agnès Bardon

**La Konvencio de 1970: Kultura diverseco antaŭ leĝoj** ......... 9
Vincent Négri

**La arto-merkato: Viktimo de la propra sukceso** .............. 11
Marc-André Renold

**"Ni devas puni la rabistojn, sed ankaŭ la aĉetantojn"** ........................................ 13
Intervjuo kun Amr Al-Azm

**Barato: Heredaĵa ŝtelo restas defio** ........................ 16
Samayita Banerjee

**La itinero de ŝtelita steleo** ................................ 18
Christos Tsirogiannis

**Sociaj retejoj: La nova Eldorado por fikomercistoj** ........... 21
Tom Mashberg

**Ĉinaj bronzaĵoj el la tuta mondo kunvenas en virtuala muzeo** ...................................... 23
Tang Jigen

**En Nederlando la muzeoj alfrontas la kolonian pasintecon de la lando** ................................. 25
Catherine Hickley

**Argentino, ĉampiono je restituoj** ......................... 28
Irene Hartmann

## ZOMO 30

**Kiam ĵaz-febro trafis la getourbojn** ........................ 31
Fotoj: Jürgen Schadeberg
Teksto: Katerina Markelova, UNESKO

## IDEOJ 40

**Rasismo: Alfrontante la nepripenseblon** .................... 40
Véronique Tadjo

## NIAJ GASTOJ 42

**"Ni devas eduki algoritmojn"** .............................. 43
Intervjuita de Agnès Bardon

## MAPANTE LA MONDON 46

**Bejruto: Rekonstruante la estontecon per edukado kaj kulturo** ................................. 47
Mila Ibrahimova



UNESKO Kuriero


## Ĉefartikolo

Dum la printempo de 2020 la san-krizo kunligita kun la monda epidemio de KOVIM-19 portis la tutan mondon al halto. Sed la eksterleĝa ŝakrado pri kulturaj propraĵoj ne ĉesis. Male, ŝakrantoj pri kulturaj varoj profitis la avantaĝon de malpliigita sekureco ĉe arĥeologiaj lokoj kaj muzeoj por iniciati eksterleĝajn fosadojn kaj ŝtelon senpune.

La ciferoj pruvas tion: la allogo al mozaikoj, funebraj cindro-vazoj, skulptaĵoj, statuetoj aŭ antikvaj manuskriptoj neniam estis pli granda. La premo de ĉi tiu allogo helpis fortigi la eksterleĝan merkaton de artaĵoj kaj antikvaĵoj, kiu nun funkcias grandparte rete – pere de retejoj, kiuj ofte donas malgrandan atenton al la origina deveno de la aĵoj.

Krimulaj kaj teroristaj organizaĵoj rapidis kapti la avantaĝojn de ĉi tiu disfendo kaj uzas la eksterleĝan komercon por financi siajn agadojn aŭ igi puraj siajn enspezojn. De 2014 la "Islama Ŝtato de Irako kaj al-Sham" organizis amasan kaj laŭmetodan rabadon de arĥeologiaj lokoj kaj muzeoj en partoj de Sirio kaj Irako, kiuj estis sub ĝia rego.

La kontraŭleĝa fluo de kulturaĵoj nun estas, laŭtakse, la tria plej granda malantaŭ drogoj kaj armiloj. Temas pri kultura temo, ĉi tiu ombra negocado, kiu prosperas en teritorioj konflikto-plenaj. Sed nun ĝi iĝis ankaŭ minaco al internaciaj paco kaj sekureco.

La Konvencio de UNESKO de 1970 pri la iloj por malpermesi kaj antaŭmalhelpi kontraŭleĝan enportadon, elportadon kaj transdonon de la posedorajto de kulturaĵoj, kiu festas sian 50-an datrevenon ĉi-jare, estas pli esenca ol iam por ĉi tiu batalo.

En duona jarcento multo estis atingita por evoluigi preventajn leĝojn, trejni profesiulojn, fortigi internacian kunlaboradon kaj kuraĝigi la redonon de ŝtelitaj aŭ kontraŭleĝe elportitaj kulturaĵoj. Pliiĝinta konscio de la moralaj kaj materiaj damaĝoj kaŭzitaj de ĉi tiu ŝakrado pruvas tion. Nun ĝi estas rekonata kiel militkrimo de Unuiĝintaj Nacioj. La decido alprenita de la membro-ŝtatoj de UNESKO festi la internacian tagon kontraŭ ŝakrado de Kulturaĵoj la 14-an de novembro ĉiu-jare ankaŭ montras tion.

Aliflanke, la malfacilo malpliigi retan ŝakradon, la malfortaj punoj por la farintoj, kaj la senprotekteco de la koncernataj teritorioj igas necesa novan nivelon de internacia mobiliziĝo.

*Ernesto Ottone Ramírez*
*Asistanta Ĝenerala Direktoro pri Kulturo, UNESKO*

*El la angla esperantigis Renato Corsetti (Italio)*

# LARĜA ANGULO



*Helena kratero produktita de Eŭfronio ĉ. 515 a.K. kaj prezentanta la morton de Sarpedono. Kontraŭleĝe elfosita en Italio en 1971 kaj aĉetita de la novjorka Metropola Muzeo de Arto en 1972, ĝi estis redonita al Italio en 2008.*

© Carabinieri

# 50-jariĝo de la lukto kontraŭ ŝakrado de kulturaĵoj

**50 jarojn post kiam ŝtatoj ĝin subskribis, la Konvencio de UNESKO de 1970 pri ŝakrado de kulturaĵoj daŭre estas la ĉefa ilo por limigi tiun plagon. En duon-jarcento intensiĝis la lukto kontraŭ tiu kaŝa komerco, kaj progresis la konsciiĝo pri la morala malprofito kiun konsistigas la rabadoj. Sed la pasio al objektoj kies prezo altegiĝis, la modereco de la punoj kaj la neprotektiteco de la lokoj situantaj en zonoj de armitaj konfliktoj, ĉiuj ĉi estas kelkaj el la multaj defioj respondendaj por bremsi la ŝakradon de tio kion iuj nomas "sangaj antikvaĵoj".**



**Agnès Bardon**

UNESKO

Aŭtunon 2019, moneroj el diversaj epokoj, antikvaj armiloj, ceramikaĵoj, fosilioj kaj pentraĵoj estis konfiskataj dum agado kombinita en pli ol cent landoj. La afgana dogano konfiskis ĉe la kabula flughaveno 971 objektojn el la nacia heredaĵo. En Madrid, raregaj antaŭkolumbperiodaj objektoj, i.a. la ora masko de Tumako, estis retrovitaj.

Entute preskaŭ 19 000 aĵoj estis kaptitaj, kaj pluraj retoj da ŝakristoj malorganizataj dum du samtempaj operacoj, el kiuj unu estis direktata de la Monda Organizaĵo de Doganoj kaj de *INTERPOL* (Internacia Organizaĵo de Kriminala Polico), la alia kunordigata de *Europol* kaj de la hispana Civila Gvardio.

Tiu ĝis nun plej grava kaptado donas ideon pri kiom disvastiĝis la ŝakrado de kulturaĵoj dum la lastaj jardekoj, sed ankaŭ pri la amplekso de la polica respondo sur internacia nivelo. La Konvencio de 1970 pri Rimedoj Aplikendaj por Malpermesi kaj Malebligi Kontraŭleĝajn Importon, Eksporton kaj Propriet-transigon de Kulturaĵoj restas la akso de la lukto kontraŭ tiu kaŝa komerco.

En ties 50-jara ekzisto, per tiu teksto UNESKO kontribuis al la atentigo de la publika opinio pri tiu ŝakrado kaj pri kio temas. Ĝi ankaŭ helpis la subskribintajn landojn, nun 140, en ilia ellaborado de leĝoj kaj preventaj rimedoj, kaj kuraĝigis al redono de kontraŭleĝe forportitaj kulturaĵoj.

Sed kvankam la leĝaroj pli-severiĝis, kvankam la atentigo de la publika opinio kreskis kaj kvankam la dispozicioj pri kontrolo, spurebleco kaj identigo de la verkoj progresis, ankaŭ la ŝakristoj, pli multaj, fariĝis pli efikaj kaj lertaj.

Enketistoj, doganistoj kaj spertuloj renkontas multajn barojn en sia malhelpado al tiu ŝakrado nun tutmondiĝinta. Unue ĉar sukcese vendiĝas la artaĵoj kaj antikvaĵoj: kvankam la komerco de kulturaĵoj ne estas nova, ĝi neniam tiom prosperis. Pro la pasio de la kolektantoj, de la vendaj galerioj kaj de la muzeoj, la valoro de artaĵoj kaj antikvaĵoj altegiĝis. En 2019 la monda spezo de tiu komerco atingis preskaŭ 64 miliardojn da dolaroj (Raporto pri la Monda Merkato de Artaĵoj).

## Kontraŭleĝa merkato

Aparte profit-dona, ĝi allogas ne nur mon-havantojn serĉantajn investindaĵon, sed ankaŭ sen-skrupulajn agentojn kaj, pli kaj pli, mafiajn kaj terorismajn organizaĵojn kiuj trovas en tiu komerco rimedon por lavi monon aŭ financi siajn agadojn.

La amplekso de la ŝakrado, laŭdifine sekreta, estas des pli malfacile konjektebla pro la malkompleteco de la malmultaj ekzistantaj statistikoj. Malpli ol duono de la ŝtato-membroj de *INTERPOL* provizas ĝin per donitaĵoj pri ŝteloj de kulturaĵoj en ilia lando. Malgraŭ la manko de precizaj nombroj, oni ĝenerale taksas ke la kontraŭleĝa komerco de kulturaĵoj staras ĉe la tria rango en la internaciaj krimaj agadoj, post la ŝakrado de drogoj kaj tiu de armiloj.

Kvankam ili estas impresaj kaj raportitaj de la amas-komunikiloj, la ŝteloj de pentraĵoj – kiel Skrik (La Krio) de Edvard Munch en 2004 en Norvegio aŭ, antaŭ nelonge retrovita, la Pastreja Ĝardeno de Nuenen en Printempo de Vincent Van Gogh en Nederlando – estas nur "la nemergita glaci-montero", la plej videbla parteto de multe pli ampleksa realaĵo: la ĉefa parto de tiu komerco okazas kaŝe, mallaŭte, laŭ serpent-formaj cirkvitoj kies ofta origino estas religiaj konstruaĵoj, muzeoj aŭ arkeologiaj lokoj situantaj en landoj trafitaj de streĉiteco.

Post transito en perantaj landoj, la ŝtelitaj aŭ rabitaj objektoj venas aldoniĝi al la kolektoj de privatuloj aŭ de komercistoj establitaj en la okcidentaj ĉefurboj. Kaj ili estas provizitaj per eksporta atesto akirita en la transita loko kaj ne en la origina lando, kion tre malofte postulas la leĝaroj de la landoj de destino.

## Sovaĝaj rabadoj

Male ol aliaj krimaj agadoj, tute malpermesataj, la komerco de kulturaĵoj estas parte malkaŝa. Tre ofte la antikvaj statuetoj, frisoj aŭ ceramikaĵoj ŝtelitaj aŭ kontraŭleĝe akiritaj estas rekte enkondukataj sur la laŭleĝan merkaton de artaĵoj. Nu, la objektoj devenantaj de nepermesitaj elfosadoj plejparte estas registritaj en neniu inventaro. Pro tio ili ne povas esti protektataj per la Konvencio de UNESKO de 1970, kaj la originaj landoj ne povas dokumenti ilian devenon.

> "La objektoj devenantaj de nepermesitaj elfosadoj plejparte estas registritaj en neniu inventaro"

Por respondi pri tiu zorgiga situacio, kaj fronte al la amplekso de la rabadoj faritaj de la organizo "Islama Ŝtato de Irako kaj al-Sham" kaj aliaj grupoj en Irako kaj Sirio, la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj voĉdonis rezolucion en 2015. Per tiu Rezolucio 2199 ĝi celis malebligi la ŝakradon de antikvaĵoj venantaj el tiuj du landoj trudante ekonomiajn kaj diplomatiajn punojn al la landoj kaj homoj profitantaj de tiu kontraŭleĝa komerco de antikvaĵoj.

Plifortikigo de la leĝaroj kaj de la punoj estas des pli necesa ĉar la kresko de la perreta komerco montriĝas, ekde dekkvino da jaroj, fortuno por la ŝakristoj: per unu musa alklako aĉetantoj el la tuta mondo povas akiri antaŭkolumbajn statuetojn aŭ antikvajn ceramikaĵojn, en plej absoluta anonimeco. Brikoj el templo en Larsa, el la epoko de Nebukadnecar (akade: *Nabu-kudur-uṣur*), rabitaj en Irako en 2003, fariĝis aĉeteblaj per *eBay* en 2005. Preskaŭ 30% el la objektoj konfiskitaj dum la operaco kondukata de *INTERPOL* en aŭtuno 2019 jam estis anoncitaj en retbutikoj.

## La sanitara krizo, pligraviga faktoro

La sanitara krizo rilata al la epidemio de KOVIM-19 ankoraŭ akcelis tiun kreskon. Dum la (unua) deviga hejmrestado, enkadre de la projekto *ATHAR* (Esplorado pri antikvaĵ-ŝakrado kaj hered-antropologio), skipo kiu priesplorasŝakradon de artaĵoj en ciferecaj retoj, konstatis ĉe la sociaj retoj plivigliĝon de la aktivecoj pri vendado de ŝtelitaj objektoj, aparte tiuj devenantaj el Mez-Oriento kaj Norda Afriko. La enketa laboro de tiu skipo kunaganta kun UNESKO alkondukis *Facebook*-on al forpelo de



© UN Photo / Amanda Voisard


*Antikvaĵo prezentita enkadre de la ekspozicio "Protektado de la kultura heredaĵo: nepra devo de la homaro", okazinta ĉe la novjorka sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en decembro 2015.*

# Kulturaj verkoj: Prospera monda merkato

Laŭleĝa merkato de artaĵoj en la mondo en 2019:

**64,1 miliardoj da usonaj dolaroj**

**82 %** el la vendoj de artaĵoj en 2019 okazis en Usono, Britio kaj Ĉinio.




Fonto: La Merkato de Artaĵoj 2020

Konjektita valoro de la grandaj privataj kolektoj de artaĵoj en 2018:

**1 742 miliardoj da $**

Fonto: Raporto de Deloitte kaj ArtTactic pri Arto kaj Financoj 2019

## Senimpostaj havenoj: La plej ampleksa kolekto de artaĵoj en la mondo...

La intereso pri la profitig-ebleco de la artaĵoj ne ĉesas kreski. Multaj verkoj estas konservataj en dekoj da senimpostaj havenoj ĉirkaŭ la mondo. En tiuj staploj, neŝarĝitaj per tarifoj kaj dogano, ili povas esti anonime revendataj, sen neceso ilin forporti el la staplejo post la negoco. Pluraj freŝaj enketoj montris, ke tiuj senimpostaj lokoj povas esti uzataj por stapli kontraŭleĝe akiritajn artaĵojn.

## Kresko de la postulado stimulas ŝakradon

**kontraŭleĝaj elfosadoj plimultiĝis en landoj kun armitaj konfliktoj.**

**Originaj landoj**
La kontraŭleĝaj elfosadoj estas plenumataj de organizitaj krimaj grupoj, sed ankaŭ de malriĉaj enloĝantoj.

→

**Perantaj landoj**
La antikvaĵoj transitas en perantaj landoj, kie ili ofte ricevas falsajn atestilojn.

→

**Cellandoj**
Kun la kompliceco de iuj agantoj de la sektoro, plejparto de la rabitaj objektoj fine alvenas en la kolektojn de privatuloj aŭ tiujn de okcidentaj aŭ aziaj negocistoj.

**En lastaj dekkelkaj jaroj,** la retoj de ŝakristoj efektivigas grandan parton de siaj vendoj per sociaj retejoj.

**En junio 2020,** *Facebook* malpermesis la komercon de historiaj kulturaĵoj per ĝiaj interretaj platformoj.

**En 120 grupoj pri vendo de antikvaĵoj per *Facebook*, oni entute nombras centmilojn da membroj en septembro 2020.**

Fonto: *ATHAR*.

Piktogramoj: © andromina / Horon / VoodooDot / LovArt / Shutterstock

la komerco de historiaj kulturaĵoj el siaj interretaj platformoj.

Tio estas unua paŝo. Lastan junion, enkadre de la 50-jariĝo de la Konvencio de UNESKO de 1970, UNESKO perrete kunigis mondajn fakulojn pri la lukto kontraŭ la neleĝa komerco de kulturaĵoj, por ekzameni la efikon de KOVIM-19 sur tiun plagon kaj konsideri eblajn respondojn por fronti la pliintensiĝon de ŝakrado. La fakuloj rekomendis la kreadon de policaj taĉmentoj specialiĝintaj pri kontrolado de la interretaj platformoj por aktive kunlabori en la malorganizado de la kontraŭleĝaj vendoj. Ili ankaŭ instigis pli sisteman uzadon de la iloj kreitaj de UNESKO kaj ties kunagantoj, i.a. la Datenbanko de UNESKO pri la Naciaj Leĝaroj Rilataj al la Kultura Heredaĵo, la ruĝa listo de Internacia Konsilio de Muzeoj (IKM) pri kulturaĵoj elmetitaj al risko, kaj la datenbanko de *INTERPOL* pri ŝtelitaj artaĵoj.

La alportota utilo estas gravega. Retro-spure trovi la originon de ŝtelita artaĵo aŭ antikvaĵo ebligas ne nur malkovri la ŝakristojn kaj ilin aresti. Plie de la propre subprema agadparto, tio ankaŭ malfermas la vojon al revenigo de la objektoj en ilian originan landon. Tiel Argentino antaŭ nelonge redonis al la najbaraj landoj gravan nombron de kulturaĵoj konfiskitaj en la lando.

Pli tikla, la demando pri redono de objektoj rabitaj dum la kolonia epoko restas fonto de streĉiteco inter la landoj, kiuj konservas riĉajn muzeajn kolektojn, kaj tiuj, kiuj postulas la revenon de objektoj kontribuantaj al ilia identeco.

Levita de kreskanta nombro da landoj, tiu reklamacia demando hodiaŭ vekas pli kaj pli vastan eĥon ĉe la granda publiko. En Nigra Pantero *(Black Panther)*, filmo produktita de *Marvel Studio*, kiu atingis en 2018 mondan sukceson, la filo de la princo N'Jobu, malamiko de Nigra Pantero, venas repropigi al si legendan armilon de Wakanda en londona muzeo. Kvankam tiu afrika lando estas fikcia, la publika diskuto pri la redono de la verkoj tamen restas tre reala.

*El la franca esperantigis Christian Lavarenne (Francio)*

> “Per unu musa alklako, aĉetantoj el la tuta mondo povas akiri antaŭkolumbajn statuetojn aŭ antikvajn ceramikaĵojn, en plej absoluta anonimeco”

## La Konvencio: pionira iniciato

**En la 1950-aj jaroj, voĉoj leviĝis por denunci la pliintensiĝon de la rabado en arkeologiaj lokoj kaj la diserigon de antikvaj monumentoj. Tio jam estis temo de diskutoj en la 1930-aj jaroj, eĉ kondukantaj al projekto de internacia traktato, antaŭenpuŝata de la Ligo de Nacioj. Sed post la Dua Mondmilito, en situacio stampita de la movado al sendependiĝoj, la demando pri la kontraŭleĝa trafiko de kulturaĵoj plivigliĝis. La junaj ŝtatoj naskiĝintaj el tiuj movadoj, zorgantaj pri reakiro de la eroj de sia kultura heredaĵo konservataj en la muzeoj de la koloniintaj landoj, batalis por la ekesto de internacia traktato kiu ĉesigu la rabadon.**

**En aprilo 1964, UNESKO nomumis komitaton de fakuloj kun la tasko verki rekomendojn cele al ekesto de konvencio. Tiu ĉi restis ses jarojn poste. Unua ilo de internacia juro por la protekto de la kulturaĵoj dum paco, la Konvencio pri la rimedoj aplikendaj por malpermesi kaj malebligi kontraŭleĝajn importon, eksporton kaj propriet-transigon de kulturaĵoj estis voĉdonata dum la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en 1970. Ĝi validiĝis la 24-an de aprilo 1972 post kiam ĝin ratifikis tri landoj : Bulgario, Ekvadoro kaj Niĝerio.**

**La subskribintaj ŝtatoj devontigas sin alpreni protekto-rimedojn en sia lando (i.a. kreo de naciaj inventaroj kaj de specialiĝintaj policaj taĉmentoj), kontroli la cirkuladon de la kulturaĵoj, aparte malebligante ilian kontraŭleĝan importadon, kaj redoni la ŝtelitajn kulturaĵojn. En 1978 estis kreita la Interregistara Komitato por Antaŭenigi la Revenon de Kulturaĵoj en sian originan landon aŭ ilian redonon kaze de neleĝa alproprigo (IKARK). La Komitato specife pritraktas la revenon aŭ redonon de kulturaĵoj perditaj aŭ rabitaj, aparte por la kazoj okazintaj antaŭ la validiĝo de la Konvencio de UNESKO de1970, kiu ne havas retroaktivan efikon. La arsenalo da rimedoj estis kompletigita en 1995 per voĉdono de la Konvencio de *UNIDROIT*(Internacia Instituto por la Unuigo de Privata Juro) pri la ŝtelitaj aŭ kontraŭleĝe eksportitaj kulturaĵoj. Ĝi koncernas ĉiujn ŝtelitajn kulturaĵojn, inkluzive de tiuj, kiuj ne estas inventaritaj kaj deklaritaj, kaj ĝi eksplicite precizigas ke ĉiuj ŝtelitaj objektoj estas redonendaj. En 1999, UNESKO publikigis la Internacian Deontologian Kodon (pri la devaro) de la negocistoj de kulturaĵoj, kiu fariĝis referenca libro por la komercistoj de artaĵoj kaj antikvaĵoj.**

**La Konvencion nun partoprenas 140 ŝtatoj. En ties 50-jara ekzisto, UNESKO, per la Konvencio, kondukis atentig-kampanjojn, helpis dekojn da landoj en ilia ellaborado de naciaj leĝoj kaj preventaj rimedoj, kaj stimulis la redonon de la kulturaĵoj kontraŭleĝe forportitaj el ilia teritorio.**

**Multaj muzeoj en la mondo, kiel la Brita Muzeo en Londono kaj la Muzeo J. Paul Getty en Los-Anĝeleso, alprenis la daton de la Konvencio de UNESKO de 1970 – kiel jaron ekde kiu oni rajtas pridubi kiel la objektoj estis akiritaj, malfaciliganta la cirkuladon de aĵoj, kiuj estis antaŭ nelonge objektoj de ŝakrado.**

***El la franca esperantigis Christian Lavarenne (Francio)***

## La Konvencio de 1970:

# Kultura diverseco

## antaŭ leĝoj

**Subskribita en 1970, la Konvencio de UNESKO estas eminenta leĝo-instrumento por kontraŭbatali rabadon kaj ŝakradon. Ĝi difinis la principojn de komuna respondeco kaj kultura egaleco, kaj tiel malfermis vojon al rajto de popoloj ĝui sian propran kulturan heredaĵon.**


**Vincent Négri**


Esploristo de la *Institut des Sciences Sociales du Politique (ISP)*, la franca Nacia Centro por Scienca Esplorado *(CNRS)* kaj la *École Normale Supérieure, Paris-Saclay.*


Kelkaj pensuloj, kiuj defendas senbridan liberalismon, vidis ideon de ia kultura naciismo en la kondiĉoj de la Konvencio de UNESKO de 1970. Ĝiaj limigoj ankaŭ estis rimarkitaj. Veras, ke la Konvencio pene klopodas krei ekvilibran sistemon por garantii reiron de kulturaj propraĵoj, kiuj estis neleĝe eksportitaj. Ĉar ĝi ne efikas sur landaj leĝoj, ĝi estas malforta antaŭ la teritoria principo de leĝoj – aŭ *lex rei sitae* (leĝo kie troviĝas la propraĵo).

Sub tiu principo, la juĝisto juĝas laŭ leĝoj de la lando kie troviĝas la objekto kiam iu ĝin ekpretendas, kontraŭe al pli favoraj leĝoj en la origina lando de la propraĵo. Oni eble rapide konkludus, ke la Konvencio estas senpotenca, ke la subskribo de la Konvencio de *UNIDROIT* en 1995 – kiu temas ĝuste pri redono de rabitaj aŭ neleĝe eksportitaj kulturaj objektoj – tion montras.

Sed estas eraro limigi la Konvencion de UNESKO de 1970 al simpla leĝo-kompreno de ĝiaj kondiĉoj. La teoria kontribuo de tiu Konvencio estas pli vasta ol ĝiaj limigoj. Kiel kolono de internacia kultur-ordo, kiu daŭre solidiĝas, la Konvencio efektive fundamentas, per principoj de solidareco kaj komuna respondeco, la protektadon de la heredaĵoj de popoloj. La artikolo 9-a, de la Konvencio, priskribas la kondiĉojn por preventi neripareblajn damaĝojn al kulturaj heredaĵoj, endanĝerigitaj de arkeologia kaj etnologia rabado.

Estas ĝuste tiuj principoj, pri komuna respondeco kaj kultura egaleco, kiuj




© Selçuk Demirel

gravigas la internacian instrumenton kaj kontribuas al la rajto de la popoloj ĝui sian propran kulturon. La Konvencio stariĝas kiel bazo, fundamentita sur tiuj principoj. Inter tiuj principoj, estas la ideo kiu aperas ĉe antaŭparolo, ke "kultura propraĵo estas unu inter la bazaj elementoj de civilizacio kaj nacia kulturo, kaj ĝia vera valoro kompreniĝas nur rilate al plej vasta informo pri origino, historio kaj tradicia aranĝo".

### Nova internacia kultur-ordo

La Konvencio fiksis doktrinon pri reiro de kulturaj propraĵoj al origina lando. Kiel konsekvenco, komuna deklaracio subskribita de Italio kaj Libio en 1998 finis konflikton pri kulturaj propraĵoj forprenitaj de Libio dum la itala koloniado de Tripolio,

komence de la dudeka jarcento. Tio okazis sub la ideoj de la Konvencio de UNESKO de 1970 – eĉ se la Konvencio ne aplikeblas, ĉar ĝi ne havas retroaktivan efikon.

Tiufoje, ne estis uzataj la leĝaj kaj instituciaj rimedoj, sed la doktrino pri justeco de reiro de kulturaj propraĵoj, kiun la Konvencio, iom post iom, pravigis. Tiel, la subskribo de la Konvencio de UNESKO de 1970 – dek jarojn post la Deklaracio pri Donado de Sendependeco al Koloniaj Landoj kaj Popoloj, de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj – starigis turnopunkton. Ĝi enkondukis internacian kultur-ordon, de kiu devenis rajto al kultura suvereneco.

La bazoj por tio aperis en la dua artikolo de la Deklaracio de 1960, kiu diras, ke "Ĉiuj popoloj rajtas... libere determini siajn politikajn statusojn kaj libere akceli siajn ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn evoluigojn".

En tiu konstruado de nova internacia kultur-ordo, la Konvencio de UNESKO de 1970 estas la ŝlosilo, aŭ mekanismo, kiu donas bazon por reguligi cirkuladon de kulturaj objektoj, kaj starigas principon pri ilia reiro al origina lando. La arta merkato, kiu ĝis tiam ne havis etikajn devojn – ekde tiam ricevis pli striktajn regulojn pri deveno de kultura propraĵo.

Pri muzeoj, la Etiko pri Akirado, publikigita de la Internacia Konsilio de Muzeoj (IKM), starigis, en 1970, ke "devas ekzisti klara kaj sufiĉa dokumentado pri origino de ĉiu akironta objekto. Tio gravas, ĉu por objekto ordinare klasifikita kiel arto, ĉu por objekto de arkeologio, etnologio, aŭ nacia kaj natura historio".

Tio estas apogita de la gvidlinioj de Usona Asocio de Direktoroj de Artaj Muzeoj (UADAM), kiuj konfirmas la devon diligente atesti la devenon de kultura propraĵo – surbaze de la ideoj de 1970.

## La rajto de kulturoj al diferenco

Nuntempe, la Konvencio de UNESKO de 1970 fortiĝas per la koncepto de kultura diverseco, proponita de la Konvencio de UNESKO pri Protektado kaj Disvastigado de Diverseco de Kulturaj Esprimoj, subskribita en 2005. La koncepto de diverseco enhavas la rajton esti diversa, kiu estas konsekvenco de la rajto al heredaĵo.

En la kampo de kulturaj rajtoj, tiu signifas, ke la ŝtatoj agnoskas sian kapablon aserti sian propran identecon per principoj de suvereneco. Tiuj fundamentiĝas sur egalaj universalaj rajtoj kaj, por kelkaj komunumoj kaj sociaj grupoj, sur garantiado de specifaj rajtoj – ekzemple, rajto al kompenso por suferega historio, okazigita de koloniado.

Ni memoru la vortojn de la germana filozofo Walter Benjamin, kiu skribis en 1940: "Estas neniu civilizacio kiu ne samtempe estas barbara. Kaj same, se civilizacio enhavas barbarecon, barbareco ankaŭ enestas en la maniero kiel civilizacio disvastiĝas". La principoj de komuna respondeco kaj kultura egaleco, starigitaj de la Konvencio de UNESKO de 1970, ankaŭ subtenas la agnoskon de kulturoj – ilian historion, diferencojn kaj valorojn.

## Respekto por unikeco

La Konvencio ne estas ilo por kultura naciismo – kiel kelkaj malkleruloj pensas – sed starigas la universalecon kaj diversecon de kulturoj. Tio veras eĉ pli, antaŭ ŝanĝoj en la interancia kultur-leĝoj dum la lastaj dudek jaroj, kiuj rimarkigis la gravecon de la komunumoj. Tiu kompreno konsentas kun la ideo, ke ĉiuj homoj akceptus kaj observus la paradigmon de universaleco, nur se ili estu agnoskitaj en sia propra identeco, surbaze de ilia kulturo kaj heredaĵo-identeco ke, kaj diferencigas ilin de aliaj kaj ligas ilin al universaleco.

Kultura diverseco, tiel, garantias plurecon de identecoj kaj respekton al tiuj identecoj. Ĝi estas fonto de aliĝo al identecoj kaj respekto al diferencoj – la signifo de la "reciproka respekto kaj aprezo inter nacioj", skribita en la antaŭparolo de la Konvencio de UNESKO de 1970.

La sama antaŭparolo rimarkigas la profundecon de scio pri homa civilizacio, la riĉiĝon de la kultura vivo de ĉiu popolo, kaj principon de komuna respekto kaj aprezo. Ankaŭ, la vojo al universaleco – surbaze de la agnosko de kultura diverseco, starigita de la Konvencio de UNESKO, subskribita la 14-an de novembro 1970.

*El la angla esperantigis Rafael Lima (Brazilo)*

> "La Konvencio starigas la principojn de solidareco kaj komuna respondeco pri protektado de la heredaĵo de popoloj"

# La arto-merkato: viktimo de la propra sukceso

**Tre gajnoriĉa, la eksterleĝa merkato de artaĵoj kaj de antikvaĵoj multe prosperis aparte danke al la freneza emo de la aĉetantoj, al la manko de leĝaro, al la kompliceco de agantoj en la sektoro, al la multobligo de rabadoj en la landoj kun milita situacio kaj al la evoluo de la vendoretejoj.**



© UNESKO/ Christelle ALIX

*Leda kaj la cigno, pentraĵtolo el la 16-a jarcento laŭsupoze pentrita de Lelio Orsi (leljo orsi), prezentita en la sidejo de UNESKO en oktobro 2019, kadre de la ekspozicio "Retrovitaj trezoroj: unikaj arto-verkoj ŝtelitaj aŭ elportitaj eksterleĝe kaj retrovitaj de la italaj policistoj".*

**Marc-André Renold**

Profesoro ĉe la Universitato de Ĝenevo, UNESKO-katedro pri internacia juro rilate al la protektato de kulturaĵoj, direktoro de la Centro pri arto-juro.

Ne malpli ol 64 miliardoj da dolaroj. Jen la sumo produktita de la merkato internacia de arto kaj de kulturaĵoj en 2019, laŭ la Raporto pri la Tutmonda Arto-merkato *(Global Art Market Report)*. Ĉi tiu cifero vertiĝodona prezentas deziregon por arto-verkoj kaj antikvaĵoj, kiu ne ĉesis kreski dum la lastaj jaroj.

La paradokso estas, ke ĉi tiu interesiĝo prezentas ankaŭ minacon por la kompleta konservado de kulturaĵoj. Ĉar la kresko de la postulo ne kuntrenas nur la evoluon de la laŭleĝa arto-merkato. Ĝi kuraĝigas ankaŭ ŝtelojn en muzeoj, en privataj kolektoj aŭ en religiaj konstruaĵoj, kaj ankaŭ la neripareblan detruon de arĥeologiaj lokoj kaj la rabadon en antikvaj konstruaĵoj kaj monumentoj.

Pro manko de statistikoj estas malfacile precize mezuri la amplekson de la eksterleĝa merkato. Analizo de la raportoj pri la policaj konfiskoj faritaj lastatempe en Eŭropo permesas ĉiuokaze kompreneti pri ĝia amplekso. Du lastatempaj ekzemploj: en oktobro 2019 la agado *Medicus*, kiu celis Bulgarion, permesis al *Europol* konfiski 4 600 aĵojn kaj aresti ok homojn. Unu monaton poste 10 000 aĵoj estis konfiskitaj kaj 23 homoj arestitaj dum agado celanta ĉi-foje Italion.

## Repurigo de artaj varoj

La enmiksiĝo de agantoj en ĉi tiu kampo – komercistoj, aŭkciistoj, muzeo-funkciuloj kaj privataj aĉetantoj – kaj sincere kaj malsincere ludas ŝlosilan rolon en ĉi tiu komerco de ŝtelitaj aĵoj.

La kompliceco de tiuj, kiuj liveras falsitajn paperojn kaj origino-atestojn fakte estas esenca elemento de la strategioj por repurigo de aĵoj, same kiel la manko de aparta regularo kaj de sufiĉaj rimedoj por respektigi la leĝon.

Ĉar kiam ili estas iam enmetitaj en la laŭleĝan arto-merkaton fare de galerioj kaj aŭkciejoj la art-verkoj kaj la kulturaĵoj originantaj el rabadoj malfacile povas esti identigataj. La dub-originaj aĵoj povas akiri videblecon pro daŭra vendado en galerioj aŭ pro ekspoziciado en muzeoj.

La multiĝo de konfliktoj en la lastaj jaroj plifortigis ĉi tiun fenomenon. La araba printempo de 2011 kaj la sekvaj enlandaj militoj servis kiel katalizilo por la sistema ŝtelo de antikvaĵoj, farita de malriĉaj loĝantoj aŭ de organizitaj krimaj grupoj.

La muzeoj, arĥeologiaj lokoj kaj monumentoj, kiuj konsistigis la unikan kulturan heredaĵon de Sirio kaj Irako, estis detruitaj de rabistoj en tiuj regionoj. En sia rezolucio 2347-a, datita en marto 2017-a, la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj esprimis zorgon kaj rimarkis, ke malleĝa komerco de antikvaĵoj ŝajnas esti unu el la financaj fontoj de la "Islama Ŝtato de Irako kaj al-Sham". La rezolucio ankaŭ reliefigas la kreskantan uzon de interreto por vendi ĉi tiujn varojn.

La disvolviĝo de interretaj vendaj programoj kaj sociaj retoj fakte konsiderinde faciligis la vendon de kontraŭleĝe forigitaj kulturaj posedaĵoj. Samtempe, teknologiaj progresoj, kiel lokaliziloj aŭ subakvaj robotoj, ebligis rapidigi kontraŭleĝajn elfosadajn agadojn, inkluzive de tiuj en malfacile atingeblaj lokoj, faciligante la rabadon.

> "Homoj, kiuj malkovris restaĵojn, preferas detrui la aĵojn aŭ meti ilin sur la eksterleĝan merkaton"

## Punoj malmulte forkonvinkaj

Fronte al ĉi tiu kreskado de trafiko, ŝtatoj reagis, adoptante regularojn ofte rekte inspiritajn de la internaciaj konvencioj de UNESKO. Sed iliaj agoj renkontas plurajn malhelpojn. Oni komencas ĉe eksportaj regularoj, kiuj estas tro rigoraj, kaj sekve ofte malfacile aplikeblaj. Krome, punaj rimedoj, kie ili ekzistas, estas ĝenerale akompanataj de ne tre konvinkaj punoj.

Alia problemo estas, ke plenumo de la validaj reguloj kutime ne estas adekvate rekompencata. Multaj el la elterigitaj aĵoj fakte ofte estas hazarde elterigitaj, dum agrikulturaj agadoj aŭ konstru-laboroj. Tamen, pro manko de rekompencoj kaj konsidere de la interrompo de ekonomia agado kaŭzita de la elfosadoj, tiuj, kiuj malkovris restaĵojn, ofte preferas detrui la aĵojn aŭ meti ilin en la eksterleĝan merkaton. Fine, la leĝaj kaj reguligaj rimedoj starigitaj de ŝtatoj ofte estas senefikaj kiam temas pri regado kaj reguligo de la agado de agantoj en la arta merkato.

Sen penado de ŝtatoj por solvi ĉi tiujn leĝajn mankojn kaj sen plifortigo de la mobilizado de la internacia komunumo, oni devas timi, ke la ŝakrado de kulturaj posedaĵoj pluhavos brilan estontecon.

*El la angla esperantigis Renato Corsetti (Italio)*

## UNESKO kaj Eŭropa Unio kunbatalas kontraŭ ŝakrado de kulturaj varoj

**Eŭropa Unio (EU), unu el la merkataj ĉefroluloj en la mondo de arto kaj antikvaĵoj, starigis striktajn normojn al siaj membro-ŝtatoj por kontraŭbatali ŝakradon de varoj kulturaj. Laŭ la Konvencio de UNESKO de 1970, kaj laŭ la rezolucioj de la Sekureca Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj en ĉi tiu kampo kaj laŭ sia propra jura kadro pri eksportado, importado kaj redono de kulturaj objektoj, EU asociiĝis kun UNESKO kaj investis pli ol 1,2 milionojn da eŭroj por subteni la efektivigon de ĉi tiuj reguligaj instrumentoj per konkretaj agadoj.**

**Ekde 2017, pli ol 600 profesiuloj de la publika kaj privata sektoroj partoprenis laborgrupojn kaj konferencojn por konsciiĝo kaj diskuto pri manieroj kontraŭbatali la kontraŭleĝan trafikon. Plifortigo de diligenteco (kontrolado de la vendisto kaj de la vendita varo) ene de la eŭropa arta merkato estas esenca parto de ĉi tiu lukto. Kunlaboro de UNESKO kun la sfero de komerco estis reasertita en marto 2018, dum konferenco pri refortigo de la kapabloj kun la titolo "Engaĝado de la eŭropa arto-merkato en la batalo kontraŭ la ŝakrado de kulturaj havaĵoj", kiu okazis en la sidejo de UNESKO en Parizo.**

**La komuna projekto kun EU ankaŭ rezultigis ilojn praktikajn kiel la libron: Lukti kontraŭ Ŝakrado de Varoj Kulturaj: Praktika Gvidilo por Juĝaj Aŭtoritatoj kaj Policaj Instancoj Eŭropaj, interretan kurson malfermitan al ĉiuj (MOOC) kaj interretaj lerno-moduloj. Konsciigo de la granda publiko en la landoj de la eŭropa merkato – precipe pere de filmetoj – estas esenca parto de la batalo, same kiel la kunlaboro inter la instancoj de la cel-landoj, transiraj landoj kaj originaj landoj.**

**La komuna iniciato de EU kaj UNESKO "Agado interregiona kaj transa" nuntempe celas grupon de ŝlosilaj profesiuloj – kulturaj kaj muzeaj aŭtoritatoj, ŝtatoficistoj, juĝaj kaj policaj oficialuloj – per plilarĝigado de la amplekso de la agado preter EU-membro-ŝtatoj por partoprenigi la partnerajn landojn de la okcidentaj Balkanoj kaj de la Ilo por Eŭropa Najbareco (IEN) de la Sudo.**

*El la angla esperantigis Renato Corsetti (Italio)*

# "Ni devas puni la rabistojn, sed ankaŭ la aĉetantojn"

La trafiko de antikvaĵoj el militaj zonoj en Okcidenta Azio kreskis konstante dum la pasintaj du jardekoj. Kvankam ekzistas internacia konsento pri kondamno de ĉi tiu malleĝa komerco, tamen malfacilas kontraŭbatali ĝin praktike. Unu maniero ĉesigi ĝin estas pliigi sankciojn kontraŭ aĉetantoj, diras Amr Al-Azm, arkeologo kaj profesoro pri okcidentazia (mezorienta) historio kaj antropologio en la Ŝtata Universitato Shawnee en Ohio, Usono.

**Intervjuo de Laetitia Kaci**

UNESKO

● ***Ĝis kiu grado muzeoj kaj arkeologiaj lokoj en konfliktaj zonoj estas elmetitaj al rabado?***

Dum armita konflikto, la ŝtato perdas kontrolon pri partoj de sia teritorio. Ĝiaj institucioj ekdegeneras, kaj ĝi ne plu povas protekti sian loĝantaron kaj sian landon. Arkeologiaj lokoj kaj muzeoj ankaŭ estas senigitaj je protekto, malfermante la vojon al ŝtelado aŭ kontraŭleĝaj elfosadoj. Fakte plej multaj raboj estas farataj de lokanoj en la regiono, kiuj perdis siajn vivrimedojn pro ĉi tiuj konfliktoj, kaj turniĝas al tia komercado por pluvivi. Terorismaj grupoj profitas ankaŭ la situacion, sed ili estas nur unu el la diversaj elementoj ekspluatantaj ĉi tiujn daŭrajn konfliktojn.

Fakte, la prirabado de kulturaj heredaĵoj ne estas nova – ĝi datiĝas de antaŭlonge. En Okcidenta Azio, artaj kontrabandaj retoj ekzistis multe antaŭ ol la regiono estis trafita de jardekoj da konflikto. La rabistoj ofte koluziis kun koruptaj oficialuloj aŭ militistoj. Eĉ kiam okazas geopolitikaj ŝanĝoj, la naturo de la rabistaj retoj restas samaj – ili adaptiĝas kaj nur ŝanĝas mastrojn depende de tiu kiu respondecas. Se terorgrupoj havas la povon en iuj regionoj, ŝakristoj adaptiĝas por kunlabori kun ili.



© Yaser Jawad / Xinhua / Newscom / ABACAPRESS.COM

*Argilaj manuskriptoj kaj antikvaj ceramikaĵoj trovitaj en la universitato de Mosulo (Irako), en aprilo 2017. Lokaj sekurecaj oficistoj konjektis, ke ili estis kaŝitaj tie post la rabado de la Mosula Muzeo fare de la t.n. "Islama Ŝtato".*

● ***Kial armitaj terorgrupoj atakas kulturheredaĵon? Ĉu nur por financi siajn agadojn?***

Ŝakrado de artaĵoj ja estas fonto de financado, same kiel trafiko de naturaj rimedoj, aŭ ĉantaĝo per kontraŭleĝaj impostoj al civilaj loĝantaroj. Sed ĉi tio ne estas la sola kialo, pro kiu ili pravigas sian agadon.

Terorismaj grupoj konscias pri la graveco de heredaĵo. Multaj el la atakoj kontraŭ ĉi tiuj kulturejoj estas oportunismaj, sed iuj ankaŭ celas ilin kun la specifa intenco kaŭzi maksimuman materian kaj moralan damaĝon. Politika malstabiliĝo kreas gravan minacon por kultura heredaĵo.

Ekzemple, la t.n. "Islama Ŝtato de Irako kaj al-Sham" atakis kaj detruis gravajn monumentojn kiel la Templo de Bel en Palmiro (Sirio), kaj la enhavon de la muzeo en Mosulo (Irako), kiel parto de kunordigita propaganda kampanjo por pruvi sian potencon agi senpune – kaj tiel montri la senpovecon de la lokaj aŭtoritatoj kaj la internacia komunumo haltigi ilin.

Kulturaj heredaĵoj ankaŭ fariĝas strategiaj lokoj por tiaj armitaj grupoj. Ili konscias pri la internacia graveco de ĉi tiuj ejoj kaj uzas ilin por sia propra profito – kiel bazoj, trejnejoj aŭ deponejoj de municio. Ili sciis, ekzemple kiam ili okupis la praan sirian urbon Palmiron en 2015, ke ili malpli riskis aeratakojn de la kontraŭa koalicio – plene utiligante la fakton, ke ĝi estas monda heredaĵo de UNESKO.

**● En 2015, reage al la kresko de kontrabandado en tiu regiono, estis unuanime adoptita la Rezolucio 2199 de la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, kiu malpermesas transliman komercadon de kulturposedaĵoj de konfliktaj zonoj. Tamen objektoj de landoj en militstato daŭre fluas en la artan merkaton. Kiel eblas tion ekspliki?**

En la plimulto de landoj, kie la arta merkato estas laŭleĝe reguligita, la detruo kaj ŝtelo de artaĵoj estas persekutataj kiel krimo. Tamen tio ne same validas por la posedo de ŝtelitaj kulturhavaĵoj.

Hodiaŭ, aŭkciejo, muzeo aŭ kolektanto akuzita pri posedo de objekto el milita zono certe povas esti procesata. Sed la rezulto de la kazo dependos de la civila jurisdikcio de la lando kie loĝas la aĉetanto. La plej malmilda puno, se oni trovas la institucion aŭ antikvaĵiston kulpa, estas ke ili devas redoni la objekton. Eble vi devos pagi monpunon, pardonpeti kaj redoni la objekton – tio estas la plej malbona afero, kiu povas okazi.

Dekmiloj da prirabitaj artaĵoj nun cirkulas kontraŭleĝe tra la mondo. Por aĉetanto aŭ vendisto, la risko esti devigata redoni unu aŭ du tiajn erojn jare estas akceptebla risko.

> “Ni devas ataki ambaŭflanke, kaj ĉe proponado kaj ĉe postulado”

Kvankam Rezolucio 2199 estis unuanime aprobita, iuj landoj, kie la jura komerco de antikvaĵoj estas permesata, prokrastis la enkondukon de adekvataj leĝaj iloj. Por ke aferoj vere ŝanĝiĝu, ĉi tiuj ŝtatoj devas esti pretaj ludi sian rolon por krimigi la komercon. Oni devas trudi severajn punojn por ke ili fariĝu vera malhelpo.

Ankaŭ necesas ŝanĝo de sinteno pri artkontrabandado. En 2019, ekzemple, okazis granda skandalo, kiam la aŭkciejo *Christie's* vendis buston de Tutanĥamono. Ĉar ĝi estis datita ĉirkaŭ 1333 ĝis 1323 a.K. fare de la internacia aŭkcia kompanio, ŝajnis sendube, ke la kvarcita skulptaĵo estis prirabita el Egiptio. Tamen la tuta diskuto en la publika sfero estis ĉu la peco estis forŝtelita el Egiptio antaŭ aŭ post 1970 – la jaro, kiam UNESKO enkondukis la Konvencion de 1970 por protekti kulturposedaĵojn. Homoj ne ŝajnis zorgi pri tio, ke la skulptaĵo estis ŝtelita, kio estas ago puninda laŭ punjuro. Ili pli zorgis pri tio kiam ĝi estis ŝtelita – kio specifus ĉu ĝi eniris la artan merkaton laŭleĝe aŭ ne.

Dum ne okazos fundamentaj ŝanĝoj en nia socio, prirabitaj antikvaĵoj, ĉu el militŝiritaj landoj aŭ el aliloke, daŭre nutros la artan merkaton.

**● Ĝis kiu grado aŭkciejoj, muzeoj kaj kolektantoj respondecas pri ŝakrado kaj disrabado?**

Esence, mi kredas, ke ŝakrado estas kiel ponto kun du ekstremoj – ne ekzistas

## Kulturaj heredaĵoj: eroj en armitaj konfliktoj

**Moneroj, statuoj, manuskriptoj, antikvaj enskriboj: ekde 2011, ĉirkaŭ cent objektoj forrabitaj en Jemeno estis venditaj en aŭkciejoj en Eŭropo kaj Usono kontraŭ ĉirkaŭ unu miliono da dolaroj. La Muzeo de Rakao (Raqqa) – unu el la unuaj siriaj urboj falintaj en la manojn de la "Islama Ŝtato de Irako kaj al-Ŝam" en 2014 – estis senigita je kelkcent gravaj pecoj. La sekvan jaron, preskaŭ 10 000 valoraj artefaktoj estis ŝtelitaj de la Muzeo de Idlibo.**

**Kaj en Irako kaj en Sirio, la terorisma organizaĵo, konsciante la merkatan valoron de tiuj objektoj, okupiĝis pri la metoda kaj amasa rabado de muzeoj kaj arkeologiejoj en la regionoj, kiujn ĝi regis. Ĝi eĉ enkondukis imposton sur la valoro de la rabitaj eroj. En raporto de novembro 2015 pri protekto de heredaĵo en situacioj de armita konflikto, Jean-Luc Martinez, prezidanto kaj direktoro de la Luvro en Parizo, rimarkas ke "sangantikvaĵoj" eble reprezentis "de dekkvin ĝis dudek procentoj de la enspezfontoj de 'Islama Ŝtato de Irako kaj al-Ŝam'". Ĉi tio igas la komercadon de kulturaj varoj, apud la trafiko de naftaj rimedoj, unu el la plej gravaj rimedoj por financi terorismon.**

**En la lastaj jardekoj, de Afganio ĝis Malio, tra Jemeno aŭ Irako, kulturaj heredaĵoj kaj varoj estis ĉe la unua linio de armitaj konfliktoj. Rektaj celoj de intenca detruo, flanka damaĝo de konfliktoj, avidataj objektoj por organizaĵoj, kiuj vidas ilin kiel profitofontojn, la kulturaj varoj troviĝas en la kerno de krimaj retoj kaj nuntempaj sekurecaj problemoj.**

**Subfosante la identecon de loĝantaroj, rabado kaj ŝakrado kontribuas al profunda malstabiligo de konfliktaj regionoj. Kiel fonto de financado por terorismo, ili nutras la spiralon de perforto kaj hipotekas la estontecon de ĉi tiuj regionoj. "La ŝakrado, la detruo de arkeologiejoj, la ekstremisma propagando kaj la neado de historio estas ĉiuj elementoj de tutmonda strategio, kaj por respondi al ili, la komunumo de nacioj devas alfronti ilin tutece", diris la ĝenerala direktoro de UNESKO, Audrey Azoulay, dum kunveno de la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj pri protekto de kulturaj posedaĵoj la 30an de novembro 2017.**

**La konscio pri la amplekso de ĉi tiu ŝakrado kaj la damaĝoj, kiujn ĝi kaŭzas, kondukis al serio de lastatempaj iniciatoj, havigantaj novan impulson al internacia kunlaboro, kvindek jarojn post la adopto de la Konvencio de UNESKO kontraŭ Neleĝa Kontrabandado .**

**En 2015, estis adoptita Rezolucio 2199, malpermesanta la komercadon de kulturaj posedaĵoj devenantaj el Irako kaj Sirio. Du jarojn poste, la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj unuanime adoptis Rezolucion 2347, kiu unuafoje igis la protekton de kultura heredaĵo sekureca imperativo kaj kondamnis la konscian detruon de kulturaj posedaĵoj kiel militan krimon.**

**Sekve de ĉi tiu rezolucio de UN, ekorganiziĝas jura respondo sur nacia nivelo. La Konsilio de Eŭropo adoptis Konvencion pri Deliktoj Rilataj al Kulturaj Posedaĵoj en 2017. En la sama jaro, Urugvajo anoncis la kreon de nacia komitato kontraŭ ŝakrado de kulturaĵoj. Laŭ la ekzemplo de Usono, kiu aprobis en 2016 novan leĝon kontrolantan importadon de kulturaj varoj el Sirio, pluraj landoj fermis siajn merkatojn al la t.n. "sangantikvaĵoj". Svedio siaflanke starigis fakan grupon pri tiu problemo ene de siaj policservoj.**

***El la hispana kaj angla tradukis Toño del Barrio (Hispanio)***

proponado sen postulado. En la artmerkato troviĝas unuflanke la proponado reprezentita de la surlokaj rabistoj, kiuj provizas la trafikretojn per objektoj. Aliflanke estas la aĉetantoj, kaj legitimaj kaj nelegitimaj, kiuj kreas la postuladon. Ni devas ataki ambaŭflanke por serioze trakti ĉi tiun problemon. Se oni traktos nur unu flankon, la aŭtoritatoj malsukcesos. Registaroj devas starigi amason da strategioj por trakti diversajn specojn de rabado.

Mi kredas, ke unu el la plej bonaj manieroj fari tion estas persekuti iun ajn, pri kiu estas pruvite, ke ĝi intence prirabis aŭ trafikis antikvaĵojn el konflikta zono – pere de la leĝoj kontraŭ terorismo, ne nur sub civilaj procesoj, kiuj ebligas ke krimintoj liberiĝu kontraŭ nur simbolaj punoj. Oni devas puni ne nur la rabistojn, sed ankaŭ la aĉetantojn.


© Éditions Gelbart

*En 2010 rabistoj, helpate de ŝtontranĉiloj, ŝtelis partojn de friso de arkeologiejo en la antikva urbo Hatra (Irako).*

**● *Ĉu oni povas trovi paralelaĵojn inter ŝakrado de antikvaĵoj kaj tiu de armiloj kaj drogoj, kiuj ankaŭ furoras en tiu regiono?***

Kontrabandado pri arto kaj antikvaĵoj kutime komenciĝas per kaŝaj elfosadoj en arkeologiejoj. La rabaĵo estas elprenata el la ejo, vendata kaj transportata kontrabande al diversaj landoj, ĝi eniras la artajn merkatojn, kie ĝi denove vendiĝas, kaj finiĝas en arta galerio aŭ privata kolekto. Ĉi tiu ampleksa procezo postulas vastajn retojn, kiuj ofte estas vastaj kaj bone establitaj. Estas konate, ke ĉiuj ĉi retoj – traktantaj armilojn, drogojn, antikvaĵojn kaj eĉ homojn – estas ĉiuj konektitaj.

La rabado en militaj zonoj daŭras senĉese, sen signifa ŝanĝo. Por aludi ĉi tiun kontraŭleĝan komercon mi preferas la esprimon "konfliktantikvaĵoj", anstataŭ "sangantikvaĵojn", kiun oni foje uzas, kaj kiu estis kreita por priskribi la kontraŭleĝan diamantan komercon. Kutime koincidas la ŝakrado de antikvaĵoj kaj tiu de armiloj. Ne malofte doganaj aŭtoritatoj trovas dum konfiskoperacoj armilojn kaj antikvaĵojn stokitajn samloke.

La retoj estas proksime ligitaj, kaj la komerco estas tro profita por ĉesi. La sola diferenco inter ŝakrado de drogoj kaj antikvaĵoj estas, ke se oni estas kaptita kun kilogramo da heroino, oni iras en malliberejon por tre longa tempo. Tamen, se oni estas kaptita kun ŝtelita antikvaĵo, oni tute ne eniras en malliberejon.

**● *Ĉu ni iam vidos la finon de kontraŭleĝa komerco de antikvaĵoj?***

Ĝi estas tre neverŝajna, ĉar la altiro trovi enterigitan kaŝitan trezoron estas simple tro granda. Tamen multaj ŝtatoj ekagas je nacia nivelo. En Mez-Oriento, ekzemple, komerco de antikvaĵoj nun estas malpermesita en la vasta plimulto de landoj. Tial, se ero el Libio, Sirio, Turkio aŭ Libano aperas sur la arta merkato, ni povas esti certaj, ke ĝi estis prirabita.

Sur la internacia nivelo, diversaj organizaĵoj helpas landajn policagentejojn malmunti la retojn de kontrabandado. UNESKO ekzemple disponas je publika datumbazo de naciaj leĝoj pri kulturheredaĵoj. La Internacia Konsilio de Muzeoj (IKM) flegas datumbazon de Ruĝaj Listoj, kiuj servas por ilustri la kategoriojn de kulturaj varoj kun plej granda risko de malleĝa trafiko. Kaj *INTERPOL* disponas je Datumbazo de Ŝtelitaj Artaĵoj, kiu estas regule ĝisdatigata.

Sed klopodoj devas esti farataj surloke. La lokaj komunumoj estas tro ofte flankenmetataj de la grandaj internaciaj institucioj, kiuj emas labori rekte sur la registara nivelo en la batalo kontraŭ ŝakrado.

Tamen, precipe dum konfliktoj furiozas, kaj kiam registaraj institucioj estas malfortaj, estas la lokaj komunumoj, la lokaj koncernatoj kaj la lokaj NRO-j, kiuj troviĝas en la unua linio.

En januaro 2018, la Muzeo de Ma'arrat al-Numan en Sirio estis trafita de du misiloj dum aviadila atako, kaŭzante grandajn damaĝojn al la nordokcidenta angulo de la konstruaĵo. Kun la helpo de la loka komunumo, kaj konkrete de la muzea direktoro, teamo de spertuloj, inkluzive de mi mem, povis viziti la ejon por taksi la damaĝon. Ni sendis la taksadon al UNESKO, kiu donis monhelpon kaj strukturan kompetentecon por helpi stabiligi la konstruaĵon kaj eviti ĝian disfalon. Ĉi tiu sukcesa kunlaboro savis la muzeon kaj malhelpis la katastrofan perdon de unu el la plej gravaj kolektoj de romiaj kaj bizancaj mozaikoj en Sirio.

Necesas trovi novajn manierojn trakti la novajn defiojn kaj situaciojn, kiujn ni alfrontas hodiaŭ. La kunlaboro de la diversaj koncernatoj ĉe la internacia, nacia kaj loka niveloj estas nepra, se ni volas ĉesigi komercadon, kiu daŭras de miloj da jaroj.

> "La plej malmilda puno, se oni trovas iun kulpa pri rabado de antikvaĵoj, estas ke ili devas redoni la objekton"

***El la hispana kaj angla esperantigis Toño del Barrio (Hispanio)***

# Barato: Heredaĵa ŝtelo restas defio

Fronte al kreskanta postulo pri siaj artaj objektoj en la tutmonda antikvaĵa merkato, Barato enkondukis striktajn leĝojn por bremsi la kontraŭleĝan eksportadon de sia arkeologia kaj kultura heredaĵo. Tamen la efektivigo de ĉi tiuj leĝoj restas grava defio pro la malriĉeco, kiu nutras rabadon, kaj la manko de taŭga sekureco por protekti historiajn monumentojn.

**Samayita Banerjee**

Esploristo en Universitato Ashoka, Barato, interesata pri arkeologio, heredaĵo kaj konservado, ŝi estis ricevanto de la stipendio Sahapedia de UNESKO en 2018.

Kaŝite proksime al Berachampa, malgranda vilaĝo en la distrikto Norda 24 Parganas de Okcidenta Bengalio ĉirkaŭ tridek kilometrojn for de Kolkato, estas unu el la plej gravaj fruaj historiaj urbaj marbordaj ejoj de orienta Barato.

Hodiaŭ ekzistas neniu spuro de la unua grandiozeco de ĉi tiu ejo de antaŭ la dua jarcento a.K. Okulfrapa ekzemplo de institucia neglekto, neadekvata esplorado, kaj nesufiĉaj konservadaj rimedoj, Chandraketugarh estas simbolo por la problemoj, kiuj subfosas la arkeologian heredaĵon de Barato hodiaŭ. Multaj artefaktoj rabitaj de la loko estis disigitaj tutmonde, kaj nun troviĝas en pintaj muzeoj kaj privataj kolektoj.

Mekanismoj por protekti ĉi tiun riĉan heredaĵon tamen ekzistas. La Leĝo pri Antikvaĵoj kaj Artaj Trezoroj, 1972 (ŝanĝita en 1976) malpermesis ian ajn eksportadon de arkeologiaj objektoj kaj efektivigis pli striktan atentemon pri individua proprieto. Ĉiuj arkeologiaj objektoj kaj ejoj estis deklaritaj ŝtata propraĵo. Ekde tiam, ankaŭ estis koncentrita penado retrovi ŝtelitajn baratajn antikvaĵojn.

Tamen, nur jarojn post la Leĝo pri Antikvaĵoj, preskaŭ 3 000 ŝteloj de antikvaĵoj estis raportitaj inter 1977 kaj 1979. Laŭ UNESKO, pli ol 50 000 artaj objektoj estis kontrabanditaj el Barato ĝis 1989. Sed oficialuloj konsentas, ke ekzakta kalkulado restas neebla.





CC BY-SA 4.0 photos by Suvadip Sanyal

*Rakontaj kaj sociaj scenoj prezentitaj sur terakotaj plakoj de Chandraketugarh, montritaj ĉe la ŝtata Arkeologia Muzeo en Kolkato.*

## Prirabado havas longan historion

La rabado de antikvaĵoj en Barato havas multe pli longan historion. Dum nuntempe rabado estas konsiderata kiel agado motivita de ekonomia gajno, ĝi iam estis legitima ago – plenumita de koloniaj regantoj de la subkontinento kiel konsekvenco de venko super la denaska loĝantaro.

La starigo de la Arkeologia Enketo pri Barato (AEB) – fondita dum brita regado en 1861, kaj nun ligita al la Ministerio pri Kulturo – estis provo protekti la kulturan heredaĵon de la nacio, konservi antikvajn monumentojn, kaj esplori kaj kontroli arkeologiajn lokojn.

AEB prenis la respondecon pri protektado kaj konservado de 3 650 monumentoj, el malsamaj periodoj ekde prahistorio ĝis la kolonia periodo. La manko de devigo de la leĝoj restas ĉefa zorgo – plejparte pro nesufiĉa personaro por certigi la protektadon de historiaj monumentoj kaj ejoj.

Estis iuj aparte impertinentaj ŝteloj de barataj trezoroj, de temploj kaj arkeologiaj ejoj. Pli ol cent erotikaj ŝtonaj skulptaĵoj estis ŝtelitaj inter 1965 kaj 1970 de la temploj Khajuraho (konstruitaj en la dinastio Chandella inter 950 kaj 1050, kaj enmetita sur la listo de Mondaj Heredaĵoj en 1986) en Madhya Pradesh. Eĉ muzeoj, kiuj devus esti tre gardataj, ne estas ŝparitaj. En 1968, 125 pecoj de antikvaj juvelaĵoj kaj tridek du raraj oraj moneroj malaperis de la Nacia Muzeo en Nov-Delhio.


CC BY-SA 4.0 photo by Suman Kumar Giri

*Restaĵoj de la ejo Khana Mihirer Dhipi, najbara Chandraketugarh, ambaŭ estas partoj de arkeologia setlejo devenanta de la dua jarcento a.K.*

> "Kial homoj protektu ion, se ili ne scias, kion ili protektas?"

## Hazardaj malkovroj

Plejparto de la kontrabanditaj artaĵoj vendiĝas en okcidento, kaj multajn pecojn ricevas muzeoj. Ofte akompanate de malĝustaj dokumentoj, la objektoj estas senditaj precipe sur maro por eviti pli striktajn kontrolojn en flughavenoj.

Multaj el ĉi tiuj ejoj restas sub la povo de lokaj antikvaĵistoj kaj kolektantoj, kiuj mem alprenis la rolojn de arkeologoj. Estas dekoj da tiaj ejoj en kaj ĉirkaŭ Sunderbanoj, la plej granda mangrovarbaro de la mondo, en malalta Okcidenta Bengalio. Dum multaj el ili estis detruitaj de la konstantaj movadoj de la kompleksaj kaj nekalkuleblaj riveroj de la regiono, multaj el ili ankaŭ estis elfositaj de la Ŝtata Arkeologia Sekcio kaj la Orienta Rondo de AEB.

Sed en la kernaj regionoj de Sundarbanoj, estas la fiŝkaptistoj kaj lokanoj, kiuj fine trovas la plej grandan nombron da artefaktoj. Ĉi tiuj neintencaj malkovroj tiam falas en la manojn de antikvaĵistoj, aŭ trovas sian vojon al lokaj antikvaĵistoj kaj muzeoj, se ili bonŝancas. Manko de regulaj publikaj aŭkcioj, maloftaj muzeaj revizioj kaj neniu jure facila alternativo por determini la merkatan valoron de objektoj trovitaj, ĉiuj kontribuas al ŝakrado.

## Edukado pri heredaĵo

Estas kontraŭleĝe akiri antikvaĵojn de nekonfirmita aŭ senlicenca komercisto. Sed en lando kiel Barato, plej multaj el ĉi tiuj objektoj estas trovitaj de farmistoj aŭ konstruadaj laboristoj kaj ili fine transdonas ilin al perantoj, kiuj estas parto de kaŝa reto. Ili pagas etan sumon al la trovinto antaŭ ol vendi ilin al tiu, kiu plej multe pagas. La severeco de la leĝoj fariĝas malutila. Sed pli grava ol leĝoj aŭ regularoj estas la bezono doni bazajn historiajn sciojn pri ejoj al la lokaj homoj – precipe en lernejoj. Ĉar, fine de la tago, kial homoj protektu ion, se ili ne scias, kion ili protektas?

Do trovantoj de artaj objektoj povus esti edukitaj pri iliaj ekonomia kaj historia valoroj – kaj la fakto, ke ili povus esti pli bone kompensitaj de registaraj aŭtoritatoj. Efektive, malriĉeco restas fundamenta problemo koncerne la rabadon de heredaĵoj.

Krom inkluzivi arkeologian kaj heredaĵan konservadon en edukado, eble utilos impliki lokajn politikistojn ĉe la panchayat (komunumaj konsilantaroj) kaj distriktaj komitatoj por pliigi atentemon kaj kontroli lokajn ŝakristojn, kiuj nuntempe havas liberan aliron al historiaj ejoj. Koncerne la ŝtatajn sekciojn kaj muzeojn, revizio kaj registrado de siaj kolektoj kaj trovaĵoj estas la plej atentinda punkto.

La kreskanta merkato pri barataj kaj aliaj aziaj artobjektoj estas kaŭzita de la disigita rilato inter la riĉaj "postul-landoj" kaj la pli malriĉaj "font-landoj". Sed la provizo de la t.n. malriĉaj landoj povas esti limigita per simplaj iniciatoj, kiujn oni devas fari tuj. Alie, baldaŭ la riĉa antikva hinda heredaĵo eble ne plu estos alirebla por sia propra popolo.

*El la angla esperantigis Jens Spillner (Germanio)*

# La itinero
## de ŝtelita steleo

**Jen la rakonto pri greka tomba steleo el la kvara jarcento a.K., plejpropone ofertita por vendo de internacia aŭkciejo en 2017. La objekto ne estis retirita el la aŭkcia katalogo, eĉ ne post avertoj de eksperto rilate al ĝia dubinda deveno, apogita per pozitiva pruvo. Estis bezonataj pli ol unu jaro kaj kelkaj iniciatoj, antaŭ ol la steleo estis fine redonata al la grekaj aŭtoritatoj.**

**Christos Tsirogiannis**

Krimmedicina arkeologo kaj eksterordinara asistanta profesoro ĉe la Arhuza Instituto pri Progresaj Studoj, Universitato de Arhuzo, Danio. Li estas kunaŭtoro de la libro Ŝakrado de Kulturo: Nova Orientiĝo por Esploroj pri la Mondskala Kontraŭleĝa Komerco de Antikvaĵoj, eldonita en 2019.

En majo 2017, *Sotheby's* la internacia aŭkciejo rete publikigis katalogon pri antikvaĵoj por sia aŭkcio en Londono, kio devis okazi post monato. Unu el la aŭkciotaĵoj estis la supra parto de greka marmora tomba steleo, dekoraciita per floreca ornamaĵo kaj fragmenta enskribo kun la komeco de la greka vira nomo ΕΣΤΙ (ΑΙΟΣ).

La valoron de la steleo, kiu datiĝas de la mez-kvara jarcento a.K., oni taksis je £ 60 000 – 90 000, kaj la proponinton oni ne nomis. La deveno, deklarita de *Sotheby's* estis: "John Hewitt, Bog Farm, Kent, 1960s". La greka deveno de la steleo – Atiko, proksime de Ateno – estis menciita sur kataloga noto.


### Surprizatakoj al fimakleristoj de antikvaĵoj

Gravaj antaŭenpaŝoj en la batalo kontraŭ kontraŭleĝa komercado estis faritaj inter 1995 kaj 2006, per serio de policaj surprizatakoj sur propraĵoj de la komercistoj de antikvaĵoj Giacomo Medici, Gianfranco Becchina, Robin Symes kaj Christos Michaelides.

Kiel arkeologo mi partoprenis en la lasta el tiuj surprizatakoj kaj identigis la steleon sur kelkaj polaroidaj kaj profesiaj fotoj de la fotografia kaj dokumentara



© Plume




© Courtesy of Dr Christos Tsirogiannis

*Dokumentoj kaj fotoj el la konfiskitaj arkivoj ebligis identigi la steleon.*




arkivo, konfiskita de Becchina, kiu estis kondamnita pro sia envolviĝo en kontraŭleĝa komercado de antikvaĵoj.

Tion sekvis longdaŭra laboro por identigi, kolekti pruvojn, malkovri la veran devenon de la steleo, informi la aŭtoritatojn, kaj fine ebligi al ĉi tiu ŝtelita antikvaĵo reveni hejmen. Por identigi negocatajn objektojn, kontribui al iliaj repatrujigoj, kaj estigi novajn procesojn kontraŭ personoj implikitaj en kontraŭleĝa komercado, oni permesis al mi oficialan aliron al ĉiuj tri arkivoj kaj aliaj. La Becchina dosiero – kiu enhavis polaroido-fotojn de la steleo – estis dediĉita al transakcioj inter Becchina kaj Antonio Savoca, konata grek-itala ŝakristo de antikvaĵoj. La Savocaj polaroido-fotoj montras la steleon nepurigitan, ankoraŭ kovrita per terkrusto kaj kun freŝaj rompiĝoj, ankoraŭ videblaj sur sia marmora supraĵo.

Kelkaj polaroido-fotoj montras, ke la steleo estis nekonvene traktata. Unu foto montras ĝin en deponejo plena de aliaj malpuraj antikvaĵoj, parte apogita sur fenestro kaj kelkaj metaltuboj.

## Kaŝante la veran devenon

La arkivo de Becchina ankaŭ enhavas dokumentojn, kiuj prilumas la devenon de la steleo. Ĝi troviĝis en la manoj de Becchina almenaŭ de 1978 ĝis 1990, kiam ĝi ŝajne estis komuna apartenaĵo de Becchina kaj George Ortiz, svisa fikomercanto kaj kolektanto. Becchina, Savoca kaj Ortiz ne estas menciataj en la sekcio pri la "deveno" en la 2017-a katalogo de *Sotheby's*. Male, tie troviĝas neniu pruvo, ke iu "John Hewett, Bog Farm" iam ajn posedis tiun antikvaĵon, speciale en la 1960-aj jaroj – nek ke Savoca iam ajn havis rilaton kun li.

Post kiam mi identigis la steleon, mi atentigis *INTERPOL*-on, la sekcion pri arto kaj antikvaĵoj de *Scotland Yard*, kaj la skadron pri arto de la greka polico en la 8-a de junio – provizante al ili ĉiujn fotografajn kaj dokumentajn pruvaĵojn. La brita polico informis min, ke la kialoj ne sufiĉis por ili por iniciati kriminalan enketon, kaj ke *Sotheby's* firme refutis tiun aserton. La greka skadro pri arto nur sciigis min, ke ili plusendis la kazon al la greka ministerio pri kulturo – kiu neniam kontaktis min.

Dum la malmultaj tagoj antaŭ la aŭkcio, la kazo kun ĉiuj pruvoj aperis sur la retpaĝo de Eŭropa Asocio de Arkeologoj (komitato pri kontraŭleĝa komercado de kultura materialo), aperigita de la arkeologino

Marianne Modlinger. Ĝi ankaŭ estis montrita sur la blogoj de la arkeologoj David Gill *(Looting Matters)*, kaj Neil Brodie *(Market of Mass Destruction)*.

En la 12-a de junio, la tago de la aŭkcio, la sendependa ĵurnalisto Howard Swains informis min, ke li ĉeestis la aŭkcion de Sotheby's kaj vidis, ke la steleo ŝajne estis vendita al neĉeestanta proponinto kontraŭ £ 48 000. Kiel ajn, kiam *Sotheby's* anoncis la rezultojn, la steleo ne troviĝis inter la venditaj objektoj.

La 6-an de julio, la retrevuo *VICE* publikigis detalojn de la kazo en sia greka eldonaĵo, enhavante la aserton de *Sotheby's*, datita de la 23-a de junio 2017: "Ni decidis ne retiri la tombokolonon de vendado laŭ nia antaŭvenda sindevigita diligenteco, kaj pro ĝia konata deveno, kiu antaŭas la tempon, kiam ĝi laŭdire estis en posedo de Becchina… En ĉi tiu kazo, la fotoj, kiujn sinjoro Tsirogiannis (la aŭtoro) diskonigis, montras la kolonon muntita sur piedestalo. Sekve de tio, en kombino kun la de ni konata deveno, antaŭante la tempon, kiam la fotoj estis faritaj, ni ne opinias, ke la fotoj povas esti bazo por pridubi la laŭleĝan pretendon de nia konsigninto."

## "Libervola gesto de bonvolo"


La respondo de *Sotheby's* ignoris la malbonan kondiĉon de la objekto, kiel videbla en la polaroidaj fotoj, kaj la envolviĝojn de Savoca, Becchina kaj Ortiz rilate al la deveno – eĉ post kiam la pruvo estis vaste publikigita.

Preskaŭ dek unu monatoj post la aŭkcio, la brita gazeto *The Times*, publikigis vastan artikolon, pri mia esploro, la 7-an de majo 2018. Ĝi ankaŭ referencis al la kazo de la steleo, kaj aldonis: "*Sotheby's* deklaris, ke ili antaŭ nelonge eksciis, ke la deveno, sciigita al ili en 2008 estas falsa. Ili diris, ke kunlaborante kun la urba polica brigado pri arto kaj antikvaĵoj (sic) en Londono, ĉiuj flankoj konsentis pri la transdono de la steleo al la grekaj aŭtoritatoj kiel libervola gesto de bonvolo". Neniuj aliaj informoj haveblis rilate al la malkovro de *Sotheby's*, ke la deveno, sciigita al ili, estis falsa (ili ankoraŭ ŝirmas la identecon de la lasta posedinto), aŭ kial ili malkovris tion "antaŭ nelonge", spite al "ampleksa esploro pri la devenloko", kio faris ilin "certaj", ke "ne estis baraĵo". Kompreneble, nomi ĝin "libervola gesto de bonvolo" signifas kaŝi la veron, ke ili estis devigitaj repatrujigi la antikvaĵon pro la pruvoj, kiuj atentas ĝian kontraŭleĝan originon.

En la 27-a de junio 2018, invitite de greka prokuroro por kontribui asisti en kuranta jura proceduro, mi atestis pri la kazo de la steleo ĉe la greka konsulejo en Londono. La sekvan tagon mi estis informita telefone de la sekcio pri arto kaj antikvaĵoj de *Scotland Yard*, ke la steleo ankoraŭ troviĝas en Londono, atendante sian repatrujigon al Grekio. Kiel ajn, la greka ministerio pri kulturo anoncis la repatrujigon de la steleo la 8-an de septembro 2018. Ĝi estas nun en la epigrafia muzeo de Ateno.

La kazo bone finiĝis, sed ĝi demonstras la envolviĝon de kelkaj el la plej "renomaj" anoj de la komerco pri antikvaĵoj, kaj substrekas la bezonon aktualigi la leĝojn en tiuj landoj, kie komerco de antikvaĵoj viglas. Estontece, la koncernaj aŭtoritatoj devas esti kapablaj agadi en pli kunordigita kaj ĝustatempa maniero, por ke la venonta ŝtelita steleo ne bezonos tiom multe da tempo por trovi sian vojon reen al sia origina devenlando.

***El la angla esperantigis Frank Lappe (Germanio)***


© Plume

# Sociaj retejoj: La nova Eldorado por fikomercistoj

**Aŭkciaj retejoj kaj sociaj retejoj fariĝis lastatempe centroj por nelica komercado de kulturaĵoj. Malgraŭ tio, ke *Facebook* antaŭnelonge malpermesis la komercadon de antikvaĵoj en sia platformo, ankoraŭ multon oni devos fari por malpliigi tiun ĉi relative novan merkaton, kiu provizas al la fikomercistoj tutmondan montrofenestron.**

**Tom Mashberg**

Verkisto, eldonisto kaj ĵurnalisto ĉe Boston Herald, kiu fokusas pri ŝtelado kaj re-enhejmigo de artaĵoj kaj antikvaĵoj. Li nuntempe regule kontribuas al la kultura sekcio de *The New York Times*. Li estas kunaŭtoro de *Stealing Rembrandts: The Untold Stories of Notorious Art Heists*, pri la ŝtelado de pluraj pentraĵoj kaj aliaj artaĵoj.

En junio 2020, post du jaroj da formalaj plendoj fare de esplorantoj pri antikvaĵoj, *Facebook* finfine agnoskis, ke ĝia platformo estis uzata kiel vasta virtuala bazaro por vendado de artaĵoj ŝtelitaj de la Mez-Oriento.

La giganta socia retejaro anoncis gravan ŝanĝon en sia regularo: "por ke tiuj artaĵoj kaj por ke niaj uzantoj ne estu endanĝerigitaj, ni de nun malpermesas la interŝanĝon, vendadon kaj aĉetadon de ĉiaj historiaj artaĵoj ĉe *Facebook* kaj *Instagram*."

Jam estis tempo por tio. Laŭ la spertuloj de *ATHAR*, kiu atentigis *Facebook* pri la skandalo jam en 2014. La interretaj platformoj ĝis nun faris malmulton por eviti kontraŭleĝan komercadon de antikvaĵoj kaj aliaj artaĵoj.

La krizo de KOVIM-19 pli komplikigis la problemojn ĉar ĝi puŝis pli kaj pli da vendistoj kaj aĉetantoj al virtuala kontakto. Ili malkovris, ke ili povas aliĝi al kelkaj grupoj en *Facebook* sen administra superrigardo kaj facile eniri la kontraŭleĝan merkaton.

## Tutmonda plago

*Facebook* fakte ne estas la nura platformo kie kontraŭleĝe oni komercas pri antikvaĵoj. Pluraj aŭkciaj retejoj – precipe *eBay*, *Invaluable*, *Catawiki* kaj *GoAntiques* – estas ankaŭ uzataj por trovi lokajn aĉetontojn, precipe en Eŭropo kaj en Usono. Teorie, la




© Courtesy of ATHAR Project

*Antikva ceramiko vendata en Facebook en januaro, 2018.*

uz-reguloj de tiuj retejoj malebligas tian komercadon.

Ekzemple, laŭ reguloj de *eBay*: "La priskribo de antikvaĵoj proponitaj por komercado devas inkluzivi la devenon aŭ historion de la posedo de tiu objekto, kaj kiam eble, foton aŭ skanaĵon de oficiala dokumento kiu inkluzivas ambaŭ devenlandon de la aĵo kaj la leĝajn detalojn de la vendo. La aĵo devas esti aprobita por eksportado aŭ importado".

Sed praktike preskaŭ ne eblas bloki la vendadon de aĵoj kiuj malrespektas tiujn regulojn.

"Pro la ege granda nombro da objektoj vendataj rete kaj pro la rapideco de la transakcioj, regula kontrolo kaj esplorado de la interreta komerco estas neebla por multaj landaj policaj fortoj" – klarigas Neil Brodie, altranga esploristo ĉe Universitato de Oksfordo, kiu okupiĝas pri arkeologio de minacataj ejoj kaj kiu publikigis multajn artikolojn pri reta komerco.

Oni malfacile povus taksi kiom da kontraŭleĝaj aĵoj ĝis nun estis aŭkciitaj rete. En raporto verkita en 2019 por la Eŭropa Komisiono pri Kontraŭleĝa Komerco en Eŭropo, Brodie asertas, ke en 2018 proksimume 52 560 antikvaĵoj estis venditaj tiamaniere en Britio, kontraŭ 1,8 milionoj da eŭroj. Granda parto el tiuj vendoj estis sendube kontraŭleĝaj.

UNESKO kaj ĝiaj partneraj organizaĵoj pri kontraŭkrima agado, inter ili *INTERPOL*, la Monda Organizaĵo pri Doganoj (MOD), kaj *UNIDROIT* ankaŭ ade kritikis la ekspansion de la reta komercado.

En virtuala konferenco pri novaj agoj por malebligi tiajn vendojn, okazinta en la 26-a de junio 2020, Ernesto Ottone Ramírez, Vic-ĝenerala Direktoro de UNESKO pri Kulturo, diris: "Ni devas pliintensigi niajn klopodojn por kontraŭbatali tiun ĉi mondan plagon". *Facebook*, *eBay* kaj aliaj retejoj, finfine, post longa tempo, estas nun pridemandataj pro ilia rolo kiel kontraŭleĝaj komercaj platformoj.

## Laŭmenda ŝtelo

Laŭ opinio de la spertuloj, la fikomercado de antikvaĵoj sur *Facebook* komenciĝis en 2011, pli-malpli samtempe kun la Araba Printempo. Laŭdire de Amr Al-Azm, profesoro pri historio de mezoriento kaj pri antropologio ĉe Ŝtata Universitato Shawnee en Ohio (Usono), kun-direktoro de la projekto *ATHAR*, ĝuste tiam la "Islama Ŝtato de Irako kaj al-Sham" pli profesiiĝis en la prirabado de arkelologiaj ejoj en Irako kaj Sirio, kaj tiucele ili multe utiligis *Facebook*-on.

"La sociaj retejoj plifaciligis la aliron al la merkato", li diris. En Septembro 2020, Al-Azm kaj Katie A. Paul, arĥeologino kaj kun-direktoro de *ATHAR*, taksis ke almenaŭ


120 grupoj ĉe *Facebook*, plejparto el ili en la araba lingvo, estis ligitaj al la kontraŭleĝa komerco de mezorientaj antikvaĵoj. Entute ili havis kelkcent milojn da membroj.

Retaj aŭkciejoj estas ankaŭ parto de la problemo. Sed kiel Paul rimarkigis, ekzemple ĉe *eBay* oni ne trovas centojn da miloj da homoj kiuj aliĝas je iu aparta kontraŭleĝa vendisto de antikvaĵoj, laŭ la maniero kiel oni trovas centojn da miloj da homoj je tiaj grupoj en *Facebook*.

“La afero estas la grandeco”, ŝi aldonis. “Ĉe *eBay* estas proksimume 182 milionoj da uzantoj. *Facebook* havas pli ol du miliardojn da homoj, kaj ĝi estas alirebla en ĉiuj evoluantaj landoj."

Kutime, tiuj, kiuj deziras vendi aŭ aĉeti artaĵojn dekomence esploras ĉe la grupoj en *Facebook*, kaj poste kompletigas la negocadon uzante ĉifre protektitajn retejojn. Aĉetontoj ankaŭ vaste diskonigas petojn pri dezirataj objektoj, kaj tiel kreas kion Al-Azm nomas “laŭmenda ŝtelo”.

En raporto de *ATHAR* publikigita en 2019, aperis multaj fotoj prenitaj de grupoj en *Facebook* kiuj montris mozaikojn, arkitekturajn elementojn, statuojn, egiptajn funebrajn maskojn kaj eĉ faraonajn sarkofagojn.



© Courtesy of ATHAR Project

*Rabitaj artefaktoj vendotaj en Facebook.*

“La fikomercistoj ne hezitas aperigi publike la fotojn de la aŭkciaj katalogoj kaj esprimi: ‘Jen, vidu kiom multe oni pretas pagi kontraŭ tio ĉi!”, asertis Paul. La enretaj fikomercistoj ankaŭ klopodas certigi al la kontraŭleĝaj aĉetontoj, ke ili ricevos aŭtentikajn aĵojn per montrado de videaĵoj pri elterigo de la artaĵoj en origina loko. Aliaj eĉ donas detalajn indikojn al aspirantaj ŝtelistoj pri kiel lokigi la perforteblajn arkeologiejojn kaj kiel ĝuste elterigi la trezorojn.

Plej multe ĝenis Paul la fakto, ke la algoritmoj de *Facebook* “rekomendis” al la uzantoj grupojn kaj retejojn dediĉitajn al fikomercado de antikvaĵoj. “Ĉiufoje, kiam *ATHAR* aliĝis al unu el al grupoj de fikomercistoj por ĝin ekzameni, tiam *Facebook* proponis tri aliajn”, ŝi diris.

*ATHAR* notis alian furoraĵon – vivan realtempan aŭkcion de la artaĵoj dum la ŝtelistoj elfosas ilin el la tero, por plie montri ilian aŭtentikecon. Post la aŭkcio, oni montras al aĉetinto kiel la objekto povas esti intence misetikedita kaj sendita tra pluraj landoj.

Kiam *Facebook* aŭ alia aŭkciretejo forbaras certan vendiston, Al-Azm kaj aliaj petis la konservadon de la paĝoj, ĉar ili povas esti uzataj kiel pruvoj fare de la policagentejoj kiuj persekutas la krimulojn kaj de la agentoj kiuj prizorgas la kulturajn heredaĵojn: finfine, tiuj fotoj kaj videaĵoj de la ŝtelistoj estas la nuraj atestoj pri la ekzisto de tiuj objektoj. Sed citante la prizorgadon de la uzanto-datumoj, la retej-estroj deklaras ke ili ne intencas konservi ajnan forbaritan enhavon.

La ondo de ŝtelitaj antikvaĵoj invadanta la retan merkaton plej probable pludaŭros. Kelkaj fikomercistoj dum longa tempo retenas la forŝtelitajn antikvaĵojn. Dum jaroj ili atendas, ke la atento pri la objektoj malvigliĝu aŭ dume ili kreas falsajn dokumentojn pri ili antaŭ ol la vendado.

En tiu ĉi kunteksto, fotoj kaj videaĵoj de la ŝtelitaj artaĵoj estas esence gravaj, asertas Amr Al-Azm, “Ili estas la cifereca pruvo, kiu posedos grandan valoron por la sciencistoj kaj ankaŭ povos esti ege helpaj por la streboj celantaj repatrujigi la valoraĵojn.”

***El la angla esperantigis Orlando E. Raola (Usono)***

> “Aĉetantoj vaste cirkulas petojn pri dezirataj objektoj, kreante situacion ‘mendi rabaĵojn’”

# Ĉinaj bronzaĵoj

## el la tuta mondo kunvenas en virtuala muzeo

**Novspeca muzeo en Tongling, orienta Ĉinio, virtuale prezentas antikvajn kuprajn kaj bronzajn objektojn devenantajn de la dinastio Han (202 a.K. – 220 p.K.), el kiuj multaj estas en muzeoj eksterlande. Ĝi antaŭmontras kiel povos esti estontaj muzeoj bitigitaj: institucioj kapablaj kunhavi siajn rimedojn kaj ebligi al tutmonda spektantaro senprecedencan aliron al iliaj kolektoj.**

**Tang Jigen**

Katedra Profesoro ĉe la Sudĉina Universitato pri Scienco kaj Teknologio (*SUSTech*) en Shenzhen, kaj arkeologo specialiĝinta pri Ĉina Bronzepoko.

Kaptitaj de la kirloj de historio, multaj kulturaj objektoj estis forprenitaj de sia devenlando kaj restas eksterlande. Ĉi tiu ŝtelita heredaĵo ĝenerale havas malmultajn ŝancojn esti redonita, almenaŭ en frua estonteco. Dum jardeka, eĉ jarcenta foresto de tiuj objektoj, kiel homoj en siaj devenlandoj esperas ĝui ĉi tiujn kulturajn trezorojn?

La urbo Tongling, en la orienta provinco Anhui, solvis ĉi tiun problemon per establado de virtuala muzeo. Tongling, kiu havas nur 1,6 milionon da loĝantoj, ŝuldas sian reputacion al la produktado de kupraj objektoj: kuprominado kaj bronzofandado komenciĝis tie fine de la 17-a jarcento. Dum la dinastio Han (202 a.K. – 220 p.K.), ĉi tiu riverhaveno (kiu situas ĉe rivero Jangzio) liveris la plej grandan parton de krudaj materialoj por fandado de kupraj moneroj. En 2016 la urbaj aŭtoritatoj, kun helpo de spertuloj, decidis konstrui muzeon dediĉitan al antikvaj kupraj kaj bronzaj objektoj. La celo de la Bitigita Muzeo de Kupro kaj Bronzo (BMKB) estas dividi interrete tutmonde la kulturajn resursojn, precipe tiuj, kiuj restas ekster Ĉinio faritaj de antikvaj ĉinoj per ĉi tiuj materialoj.

### Tre speciala rinocero

Inter la trezoroj kiujn la vizitantoj povos ĝui en la retejo BMKB (inaŭgurita antaŭ la fino de 2020) aperas "100 majstroverkoj en ĉina bronzaĵoj", interreta ekspozicio de cento da bronzaĵoj elektitaj de arkeologoj per voĉdona procezo. Ĝi inkludas ĉinajn verkojn el kolektoj de muzeoj eksterlandaj. Alia ekspozicio, "100 rakontoj pri bronzaj objektoj", rakontas detalojn pri kiel ĉi tiuj bronzaĵoj forlasis Ĉinion kaj ankoraŭ restas eksterlande.



© Ji Zhifeng

*Virtuala ekspoziciejo de la Bitigita Muzeo de Kupro kaj Bronzo en Tongling, Ĉinio.*

Unu el ĉi tiuj rakontoj klarigas kiel Xiao-Chen-Yu-Zun – 3 000-jara bronza ritovazo en formo de rinocero, de la dinastio Shang (1600 – 1046 a.K.) – atingis Parizon per artkomercisto C.T.Loo kaj estis aĉetita de Avery Brundage, usona sporta administranto kaj eksa prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato (IOK). Ĉi tiu rita vazo de la Ĉina Bronzepoko, unika pro sia besta formo, estis finfine donacita al la Muzeo pri Azia Arto de San-Francisko, kie ĝi restas kiel unu el la plej vizitataj verkoj de la institucio, kaj eĉ funkcias kiel ĝia maskoto.


© Zu Jie

La ideo dividi kulturajn rimedojn interrete ne estas nova. Multaj muzeoj, membroj de la reto de Internacia Konsilio de Muzeoj (IKM), havas sian propran retejon. Kio igas BMKB-on unika, estas ke ĝi integras kaj prezentas kulturajn rimedojn, kiuj estas disigitaj tra diversaj landoj. Ĉinio suferis grandajn perdojn de sia kultura heredaĵo dum jarcentoj. Oni kalkulas ke milionoj da objektoj forlasis la landon per malsamaj rimedoj.

## Pli ol nura retejo

En la enketo, kiun mi mem faris en 2016, pli ol 90% inter la personoj intervjuitaj esperas, ke la kulturaj objektoj forlasintaj Ĉinion reveniĝos je iu tago al sia devenlando. La fakto, ke ili nun estas rete viziteblaj ĉe BMKB povos kontribui por mildigi multjarajn streĉojn inter Ĉinio kaj la landoj kiuj nuntempe gastigas ilin.

Kvankam BMKB estas noviga ideo, ĝi estas limigita interrete al certa kategorio da objektoj, nome ĉinaj bronzaĵoj. Sed en la estonteco, bitigitaj muzeoj estos konstruitaj kaj administrataj de pluraj institucioj funkciantaj kunlabore en diversaj landoj, kaj integrante amason da rimedoj. Ĉi tiuj novaj muzeoj povus esti nomataj "reto de bitigitaj muzeoj" aŭ "nubmuzeoj".

Ili nek estos simple retejoj ekspoziciantaj specifajn kolektojn de muzeo nek retejo kiu grupigas plurajn muzeojn, sed la frukto de kunlaboro inter malsamaj institucioj tra la mondo. Ĉi tiuj futurecaj bitigitaj muzeoj jam ekzistas: la enretaj ekspozicioj de la Muzeo de Arkeologio kaj Antropologio de la Universitato de Kembriĝo kaj la Brita Muzeo, ambaŭ en Britio, estas ekzemplo.

La rapida kaj sensacia progreso en stokado de amasa dateno kaj en transigaj teknologioj antaŭenigas naskiĝon de ĉi tiuj nubmuzeoj. Iuj kleruloj antaŭdiras ke alveno de tiaj muzeoj povos ŝanĝi nunan staton de ĉi tiuj institucioj, kaj eĉ kulturon ĝenerale.

## Senlimaj ebloj

Estonte ĉi tiuj bitigitaj muzeoj povos elekti diversajn specojn de objektoj sur iu gamo de temoj kaj projekti ekspoziciojn neniam antaŭe viditajn, danke al la kuniĝo de grandega datenkvanto. Ili sendube estos ankaŭ kapablaj interpreti kaj elmontri objekton plurmaniere danke al alvoko de kulturaj rimedoj tutmonde. Kleruloj el diversaj landoj povos dialogi inter si kaj kun publiko pri la montrataj objektoj.

Antaŭ 3 000 jaroj, dum la dinastio Shang (la plej antikva dinastio registrita de arkeologoj en la ĉina historio), bronzometiistoj kreis almenaŭ du konatajn objektojn en kiuj tigro formanĝas homon. Pro historiaj kialoj, ĉi tiuj du objektoj estas nun en kolektoj de Muzeo Guimet en Parizo kaj la Muzeo Sen-Oku Hakukokan en Kioto. Se ĉi tiuj du muzeoj kaj ĉinaj arkeologoj specialiĝintaj pri la periodo Shang kunvenus ene de nubmuzeo iutage por dividi iliajn konon kaj la historion pri tiuj objektoj kun monda publiko, tio estus mirinda!

*El la franca kaj angla esperantigis Kim Ribeiro (Brazilo)*

> "Tio, kio igas la virtualan muzeon unika estas, ke ĝi montras kulturajn rimedojn disvastigitajn tra malsamaj landoj"

# En Nederlando

## la muzeoj alfrontas la kolonian pasintecon de la lando

**La nederlanda Nacia Muzeo de Mondkulturoj *(National Museum van Wereldculturen)* estas pionira: ĝi estis unu el la unuaj muzeoj en Eŭropo disvolvintaj mekanismojn por rehejmigi artefaktojn rabitajn el iamaj kolonioj.**

**Catherine Hickley**

Sendependa artĵurnalisto bazita en Berlino, ŝi estas regula kontribuanto al *The Art Newspaper* kaj *The New York Times*, kaj la verkinto de *The Munich Art Hoard: Hitler's Dealer and His Secret Legacy* (esplorraporto pri la artverkoj rabitaj de la nazioj dum la Dua Mondmilito).

En 2014, la Tropikmuzeo *(Tropenmuseum)* en Amsterdamo estis minacita per fermo, kiam la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj informis, ke ĝi estis retironta financadon de ĝia posedanto, la Reĝa Tropika Instituto (RTI).

La muzeo estis fine savita per la kreo de nova institucio por administri la naciajn etnografiajn kolektojn. La Nacia Muzeo de Mondkulturoj (NMM) estis fondita en 2014 per kuniĝo de la Tropikmuzeo, la Muzeo Volkenkunde en Lejdeno (Leiden) kaj la Afrika Muzeo en Berg en Dal. Ĝi ankaŭ kontrolas Nacian Muzeon de Mondkulturoj en Roterdamo, kies kolekto apartenas al la urbo.

Sed dum tiuj monatoj, kiam demandosigno pendis super la estonteco de la Tropikmuzeo, iuj gravaj identeckrizoj okazis inter la gardantoj de la nederlandaj etnografiaj kolektoj.

"Ĉi tiu minaco estis vekkrio por ĉiuj ĉi institucioj", klarigas Stijn Schoonderwoerd, ĝenerala direktoro de la Nacia Muzeo de Mondkulturoj. "Ĝi igis nin pridubi nian kolonian historion kaj ni vidis, ke ni havas la eblon fari multajn demandojn pri identeco, kontrolo, potenco, malegaleco kaj malkoloniigo."




© Rob van Esch

*La Tropikmuzeo de mondaj kulturoj, loĝigita en impona konstruaĵo en Amsterdamo, estas parto de la Nacia Muzeo de Mondkulturoj ekde 2014.*

### Klara avantaĝo

Ĉi tiuj demandoj rilatas ne nur al NMM – ili leviĝis tra Eŭropo dum la lastaj jaroj. En 2017, en parolado en Ŭagaduguo (Burkino), Emmanuel Macron, prezidento de Francio, promesis definitive redoni afrikajn heredaĵojn en francaj muzeoj. Li komisiis tiucelan raporton al la senegala profesoro Felwine Sarr kaj la franca arthistoriisto Bénédicte Savoy. Ĝi estis publikigita en 2018, kaj rekomendis la revenon de subsaharaj afrikaj artefaktoj konservitaj en francaj muzeoj. En junio 2020, leĝpropono permesanta redoni dudek ses prirabitajn artefaktojn al Benino kaj historigrava glavo al Senegalo estis aprobita kiel unua paŝo al plenumo de ĉi tiu prezidenta devontigo.

En Germanio, la ministroj pri kulturo de la dek ses federacieroj konsentis pri siaj propraj gvidlinioj en marto 2019. Ili promesis krei la kondiĉojn por la repatriigo de artefaktoj en publikaj kolektoj, kiuj estis prenitaj "laŭ manieroj hodiaŭ laŭleĝe aŭ morale nepravigeblaj" el iamaj kolonioj. En Britio, la Instituto pri Arto kaj Juro, komisiite de la Konsilio pri Artoj de Anglio, ellaboras konsilaron por muzeoj, kies publikigo estas planita por aŭtuno 2020.

Sed la NMM prenis avantaĝon en tiu tasko. Doktora tezo de 2016 de esploristo Jos van Beurden, publikigita en la angla kiel Trezoroj en Fidindaj Manoj: Negoci la Estontecon de la Koloniaj Kulturaĵoj, aldonis impeton al la nederlanda debato pri koloni-epokaj artefaktoj. "Ĝi havis sufiĉe multe da efiko",



© Kirsten van Santen

Ekde 2017, Postsklaveca Tempo, ekspozicio ĉe la Tropikmuzeo, spuras la historion de sklaveco kaj esploras ties aktualajn postsekvojn.

asertas Henrietta Lidchi, ĉefa kuratoro ĉe NMM.

La muzeo komencis labori pri gvidlinioj por repatriigo en 2017. Kvankam repatriigoj okazis dum la jardekoj, la petoj antaŭe estis pritraktitaj laŭ individua gvidlinio. "Ni transiras de kaz-al-kazaj scenaroj por fari ĝin pli sistema kaj justa", komentas Lidchi. "Sed necesis struktura ŝanĝo por ke ĉi tio okazu".

La gvidlinioj estis adoptitaj la 7an de marto 2019, kaj publikigitaj en dokumento nomita "La redono de kulturobjektoj: principoj kaj procezo". La intenco de la dokumento estis esprimi "la ĝeneralan mision de la muzeo por trakti la longajn, kompleksajn kaj interimplikitajn historiojn, kiuj rezultigis la kolektojn, kiujn la muzeo tenas". Ĝi entenas "devontigon por travideble trakti kaj taksi petojn pri redono de kulturaj objektoj laŭ normoj de respekto, kunlaboro kaj rapideco."

## Sen protestoj de civitanoj

La gvidlinioj ampleksas ne nur la ŝtelitan heredaĵon – ili inkludas devontigon redoni artefaktojn tre valorajn al originaj komunumoj, sendepende de la maniero kiel ili estis akiritaj. Postulantoj ankaŭ ne devas pruvi, ke ili havas taŭgan muzeon por gastigi resenditajn objektojn – faktoron ofte uzatan en la pli vasta diskuto kiel kialon kontraŭ repatriigo.

La publika respondo al la novaj politikoj de la muzeo estis pozitiva. "Kontraŭ miaj antaŭtimoj, kiam ni prezentis nian pozicion ne estis multe da opozicio kaj neniu protestego de politikaj grupoj aŭ civitanoj dirante, ke ni devas konservi ĉion", diras Stijn Schoonderwoerd.

## UNESKO faciligas intertraktadojn inter landoj

**Ekde 1978 ekzistas internacia meĥanismo por perado inter ŝtatoj pri la aferoj rilataj al redono, aŭ la reveno de perditaj kulturhavaĵoj. Ĝi traktas kulturobjektojn perditajn kiel rezulto de fremda aŭ kolonia okupo, aŭ post antaŭa ŝtelo – farita antaŭ la ekvalido de la Konvencio de UNESKO de 1970 ĉe la koncernaj ŝtatoj.**

**Kreita de UNESKO, la Interregistara Komitato por Antaŭenigi la Revenon de Kulturaj Posedaĵoj al Ĝiaj Landoj de Origino aŭ Ĝian Redonon Kaze de Kontraŭleĝa Alproprigo (IKARKP) estas konstanta organo, sendependa de la Konvencio de 1970. Ĝia misio estas faciligi intertraktadojn inter landoj kaj kuraĝigi ilin fini interkonsentojn.**

**Sub la egido de la Komitato, en januaro 2020 Germanio redonis la ŝtonon de Kueka – konsideratan sankta de la indiĝena komunumo Pemonoj – al Venezuelo. Ĝi estis portita al Berlino kiel parto de ekspozicio antaŭ pli ol du jardekoj, kaj ĝi estis montrata ĉe la Tiergarten-Parko de la ĉefurbo ekde 1998.**

**Alia ekzemplo, kiu ilustras la sukceson de la Komitato: la mankantaj fragmentoj de romia mozaiko malkovrita en la praa urbo Zeugma en la nuntempa provinco Gaziantepo (Turkio) – kiu formis parton ekde 1965 de la arta kolekto de la Bowling Green State University en Ohio – estis redonitaj al Turkio de la universitato en 2018.**

***El la hispana kaj angla esperantigis Toño del Barrio (Hispanio)***

> “La publika respondo al la novaj politikoj de la muzeo estis pozitiva”

Tiu sinteno povus ŝanĝiĝi kiam tiu politiko aplikiĝos je nacia skalo. La muzea direktoro ne ekskludas la riskon, ke ekstremdekstraj grupoj povus kontraŭstari la rehejmigon de pecoj de nederlandaj muzeoj por provoki naciisman senton.

## Sur la spuro de koloni-epokaj objektoj

La muzeo entute gastigas ĉirkaŭ 450 000 erojn. Lidchi diras, ke laŭ “proksimuma takso” de NMVW ĉirkaŭ kvardek procentoj de la kolekto estis akiritaj en koloniaj kuntekstoj. Ekde 2019, por la unua fojo, la muzeo havas du plentempajn esploristojn por studi la devenon de la pecoj. La muzeo petis registaran esplorstipendion je 4 milionoj da eŭroj por financi kaj akceli ĉi tiun ampleksan taskon.

Kunlabore kun la *Rijksmuseum* en Amsterdamo kaj la Centro de Kompetenteco pri Redono de Kulturaj Varoj kaj la Dua Mondmilito ĉe la Instituto NIOD pri Studoj pri Milito, Holokaŭsto kaj Genocido, NMM komence fokusiĝas ĉefe pri Indonezio – kun projektoj por firmigi esploradon pri ekzemple koloni-epokaj militaj ekspedicioj kaj komercejaj retoj.

La muzeo ankoraŭ ne ricevis oficialajn postulojn per tiuj ĉi novaj kanaloj – eble parte pro la koronvirusa pandemio. Sed la institucio ekdiskutas kun multaj malsamaj grupoj de eblaj postulantoj, inkluzive de indiĝenaj komunumoj en Nordameriko. NMM ankaŭ kunlaboras de antaŭ longe kun la Nacia Muzeo de Indonezio por interŝanĝi informojn kaj igi la kolektojn komune alireblaj.

## La reveno de ponardo de indonezia heroo

En marto 2020, surbaze de esploroj faritaj de la muzeo, la nederlanda kulturministro redonis or-inkrustitan krison – grandan ponardon – al la indonezia ambasadoro en Hago. Ĝi estis aparteninta al princo Diponegoro, java ribelestro kaj indonezia heroo, kiu gvidis kvinjaran militon kontraŭ nederlanda kolonia regado de 1825 ĝis 1830. Iuj el liaj havaĵoj, inkluzive de selo kaj lanco, estis rehejmigitaj al Indonezio en la 1970aj jaroj pro rekomendo de komitato de nederlandaj kaj indoneziaj spertuloj. La krison oni povis trovi nur kelkajn jarojn pli poste.

NMVW ankaŭ estas membro de la Benina Dialoga Grupo, fondita en 2007, kiu konsistas el eŭropaj muzeoj kun posedaĵoj de artefaktoj de la iama Reĝlando de Benino, prirabitaj de britaj trupoj en 1897, kaj el reprezentantoj de Niĝerio.

Tiuj muzeoj ĵus ricevis financadon por krei bitan stokregistron de la tiel nomataj Beninaj bronzoj (kiuj devenas el la praa reĝlando Benino, nun en suda Niĝerio) kaj ankaŭ konsentis prunti kolektojn al Beninurbo en Niĝerio laŭ sinsekva proceduro – kvankam ili ĝis nun rifuzis promesi definitive redoni ilin. “Mi ne dubas, ke okazos rehejmigo de prirabitaj beninaj objektoj de eŭropaj muzeoj al Niĝerio,” asertas tamen Schoonderwoerd.

Kritikoj al NMM fakte venas ĉefe el tiuj, kiuj kredas, ke la redona procezo tre malrapide moviĝas. En junio 2020, grupo de aktivuloj trafis la fasadon de la Tropikmuzeo per blankaj farboĵetaĵoj por protesti kontraŭ homajn restaĵojn en ĝia kolekto – eĉ se samtempe en deklaro ili agnoskis la devontigon de la muzeo trakti sian kolonian pasintecon.

Sed Schoonderwoerd atentigas, ke la administrantaro de la muzeo estas nur la gardanto de la nacia kolekto. Ĉiu rehejmigo bezonas la aprobon de la Ministerio pri Kulturo, kaj kutime postulas longajn diplomatiajn intertraktadojn.

“Kiel organizoj zorgantaj pri heredaĵo, ni fariĝis parto de politikaj procezoj, kiujn ni ne regas”, li atentigas. “Foje oni kulpigas nin kaŝiĝi malantaŭ la ŝtato. Sed ni ne povas simple redoni ion propriniciate. Redono ne estas afero rilata al heredaĵo, ĝi estas politika ago”.

*El la hispana kaj angla esperantigis Toño del Barrio (Hispanio)*



➲ *Ponardo aparteninta al Princo Diponegoro kaj loĝigita ĉe la Muzeo Volkenkunde, la Nacia Muzeo de Etnologio en Lejdeno, estis resendita de Nederlando al Indonezio en marto 2020.*

© Courtesy of Museum Nasional Indonesia in Jakarta (MNI 192.999)

## Iuj ekzemploj de redono de artaĵoj

**2020: Sumera vota murplataĵo el kalkŝtono, datita ĉ. 2400 a.K. kaj forrabita el Irako, baldaŭ estos resendata de la Brita Muzeo al Irako.**

**2014: Du tantrostilaj bareliefoj de la naŭa kaj deka jarcentoj, prezentantaj interplektitajn amantojn kaj ŝtelitaj de templo en Raĝastano en 2009, estis resenditaj al Barato el Usono.**

**2010: Makonda masko, ŝtelita en 1984 de la Nacia Muzeo en Daresalamo, estis resendita de la Muzeo Barbier-Mueller en Ĝenevo (Svislando) al Tanzanio.**

**2006: La totema paliso G'psgolox, apartenanta al la pranacio haisloj, estis resendita al Kanado fare de la Muzeo de Etnografio en Stokholmo (Svedio). Ĝi estis la unua totemaĵo redonita de eŭropa ŝtato.**

**2000: Ŝtona skulptaĵo Uma Maheshwar de la 12a jarcento, montranta la hinduan dion Ŝivo kaj lian edzinon Parvatio, ŝtelita en Nepalo en 1982, estis resendita al Nepalo de la Muzeo pri Hinda Arto en Berlino (Germanio).**

**1989: Mantelo de la parakasa kulturo, 2000-jaraĝa ŝtofo ŝtelita el la Nacia Muzeo en Limo, estis resendita al Peruo de la Nacia Galerio de Aŭstralio.**

*El la hispana kaj angla esperantigis Toño del Barrio (Hispanio)*

# Argentino,

## ĉampiono je restituoj

**Ekde 2004, Argentino redonis al iliaj devenlandoj ĉirkaŭ 5 000 objektojn kaptitajn en sia teritorio. Pli granda rekono de antaŭkolumbaj civilizoj kaj alpreno de leĝo protektanta la arkeologian kaj paleontologian heredaĵon kuŝas je la origino de tiu nova politiko.**


**Irene Hartmann**

Ĵurnalisto ĉe la gazeto *Clarín*, bazita en Bonaero


La gazetaro nomis ĝin "la ŝtelo de la jarcento". Ĝi estis spektakla, sendube. En julio 2002, kelkaj individuoj fosis 30-metran tunelon por eniri la kelon de la Nacia Muzeo de Belartoj en Asunciono, Paragvajo. Kvin pentraĵoj estis ŝtelitaj, inkluzive de *Sankta Hieronimo*, anonima pentraĵo de la 16-a jarcento taksita je 200 000 usonaj dolaroj. La rompŝtelistoj eskapis kaj transiris la landlimon en Argentinon. Post nelonge, la pentraĵo estis disponigita por vendo en Posadas, en la nordoriento de la lando. Sed sekurecaj fortoj spuris ĝin en 2008 – kaj Argentino redonis la artaĵon al Paragvajo la saman jaron.

La historio pri la redono de *Sankta Hieronimo* ne estas izolita kazo. Ekde 2004, Argentino redonis 4 825 pecojn de ŝtelita heredaĵo – artaĵojn, arkeologiajn restaĵojn kaj historiajn dokumentojn – kaptitajn sur sia grundo, al aliaj devenlandoj. Dum la lasta jardeko, la lando iĝis regiona modelo pri redono de ŝtelitaĵoj.

María Florencia Galesio, direktoro de esplorado ĉe la Nacia Muzeo de Belartoj en Argentino, klarigas, ke tiu politiko estas la rezulto de kreskanta konscio pri la heredaĵa valoro de objektoj el antaŭhispanaj kulturoj. "Antaŭkolumba arto, kies estetika valoro estis dum longa tempo subtaksita, ĝuis pli grandan rekonon en la lastaj dekkvin jaroj", diris ŝi.

La malfermo en 2004 de antaŭkolumba artgalerio ĉe la Muzeo de Belartoj en Bonaero estis decida paŝo por la rekonigado de tiuj restaĵoj de pasintaj civilizoj. "Ĝi estas pruvo pri estetika valoro kiun ni nun donas al la elmontraĵoj, preter ilia etnologia aŭ arkeologia dimensio", aldonas Florencia Galesio.



© MNBA Collection Buenos Aires Argentina (9130)

Antropomorfa ceramika vazo de heredaĵo Ciénaga, el la antaŭkolumba periodo

## La kazo Janeir

"Tiu ĉi valorigo ŝuldas multon al muzeologiaj institucioj, sed la fenomeno ne aperis de nenie – ĝi akompanis la adopton de leĝo pri protektado de arkeologia kaj paleontologia heredaĵo en 2003", diras la esploristo. Temas pri la sama jaro en kiu Argentino ratifis la Konvencion de UNESKO de 1970 por batali kontraŭ neleĝa komerco. La nova leĝaro komisias al la Nacia Instituto pri Latinamerika Antropologio kaj Penso (NILAP) la efektivigon de la leĝo je nacia nivelo kaj devigas posedantojn de objektoj devenaj de arkeologiaj kaj paleontologiaj lokoj oficiale registri tiujn objektojn.

La alpreno de la leĝo en 2003 rilatas al la "kazo Janeir", kiu havis influon sur la publika opinio kaj helpis pensmanierojn kaj leĝaron evolui. Komence de la 2000-aj jaroj, oficistoj de la agentejo por leĝa observigo Flughavena Sekureca Polico estis surprizitaj rimarki grandan nombron da arkeologiaj objektoj transirantaj la Internacian Flughavenon Ezeiza de Bonaero.



© MNBA Collection Buenos Aires Argentina (8936)

Bronza disko de Santamariana kulturo, datiĝanta el la antaŭkolumba periodo.

Ili turnis sin al NILAP, kiu trejnis oficistojn por identigi arkeologiajn kaj paleontologiajn restaĵojn. Inter 2000 kaj 2001, ĉirkaŭ 10 000 objektoj estis konfiskitaj en diversaj vendejoj de la argentina ĉefurbo. La plimulto apartenis al antikvaĵisto Néstor Eduardo Janeir.

Estas malfacile taksi la merkatvaloron de la aĵoj redonitaj de Argentino en la lastaj dekkvin jaroj, proksimume. "Ĉar la aĉetado kaj la vendado de tiuj ĉi objektoj estas malpermesata, arkeologoj malemas taksi ilin. Por multaj pecoj, ni havas neniun prezon; por aliaj, ni faras taksojn surbaze de la vendanoncoj de la leĝrompintoj. Povus esti kelkaj centoj, miloj aŭ milionoj da dolaroj", klarigas Marcelo El Haibe, komisiito de la federacia polico respondeca pri la Protektado de Kultura Heredaĵo, de la *INTERPOL*-federacia polico de Argentino.

Fakte, nur iom pli ol tri elcentoj de la ĉirkaŭ 5 000 objektoj repatriigitaj al siaj devenlandoj havas "prezon" algluitan. Ili valorus ĉirkaŭ 860 000 usonajn dolarojn entute se tiuj pecoj estus venditaj je la nigra merkato. Ĉu tio ne sufiĉas? Sed tiu cifero malmulte prezentas la gravecon de tiuj restituoj, kio postulus rekalkuli la vendvaloron de la restantaj naŭdeksep elcentoj – cifero kiu ĉiukaze ne spegulus la multe pli signifan simbolan valoron de la koncernaj objektoj.

## Peruo, ĉefa profitanto

Peruo, unu el landoj plej trafitaj de ŝakrado en la regiono, situas ĉe la pinto de la listo de ŝtatoj kiuj profitas la restituon de objektoj fare de ĝia argentina najbaro – kun okdekok elcentoj de reakiritaj ŝtelitaj aĵoj. Ĝin sekvas Ekvadoro, al kiu revenis nur naŭ elcentoj de ĝiaj ŝtelitaĵoj. En 2016, 439 objektoj de ekvadora heredaĵo kaj 4 150 pecoj de perua heredaĵo, konfiskitaj antaŭ sep jaroj, estis restituitaj al siaj devenlandoj. Restituoj estis ankaŭ farataj al Bolivio, Paragvajo kaj Hispanio.

Mapoj kreitaj de Ptolemeo – egipta astronomo, matematikisto kaj geografo de greka deveno el la dua jarcento – estis ŝtelitaj de la Nacia Biblioteko de Hispanio en 2007 de viro ŝajniginta sin esploristo. Du el la ŝtelitaj mapoj estis trovitaj en Argentino, kie la ŝtelisto loĝis. Ili estis restituitaj al Hispanio la saman jaron.

Kiel en la kazo de la hispanaj mapoj, estas kutime, ke ŝakristoj de antikvaĵoj uzas labirintajn vojojn trans limoj kaj oceanoj. "Tial la viktimoj raportas tiujn incidentojn en sia propra lando, dum ŝtelitaĵoj estas ĝenerale vendataj en aliaj landoj – kio ne faciligas la laboron de la enketistoj" diras El Haibe, kiu taksas ke la neleĝa komerco valoras ĉirkaŭ 6,5 miliardojn da usonaj dolaroj ĉiujare.

Por esti sukcesaj, tiuj operacioj ofte postulas la kunlaboron de policaj servoj de diversaj landoj, sed ankaŭ la uzon de ekstera sperto por identigi objektojn. "Ni laboras flank-ĉe-flanke kun aliaj organizaĵoj, kiel ekzemple NILAP, aŭ la Argentina Muzeo pri Naturaj Sciencoj Bernardino Rivadavia, se temas pri paleontologiaj pecoj. Nia sukceso estas la rezulto de nia engaĝiĝo en tiu ĉi interfaka laboro", diras El Haibe.

La plej freŝdata sukcesa operacio okazis en 2019. 115 dokumentoj redaktitaj inter 1824 kaj 1900 kaj taksataj je 10 000 dolaroj, trovitaj en vendejo de Bonaero, estis retrovitaj. Ili baldaŭ estos restituataj al Peruo, kie ili estis ŝtelitaj.

*El la angla esperantigis Manuela Burghelea (Brazilo)*

> "Antaŭkolumba arto, kies estetika valoro estis dum longa tempo subtaksita, ĝuis pli grandan rekonon en la lastaj dekkvin jaroj"



*Antropomorfa ceramika vazo de la kulturo Condorhuasi, el la antaŭkolumba periodo*

© MNBA Collection Buenos Aires Argentina (894)

# ZOMO



# Kiam ĵaz-febro trafis la getourbojn



**Fotoj: Jürgen Schadeberg**
**Teksto: Katerina Markelova,** UNESKO

Jürgen Schadeberg (1931-2020), la fotisto kiu dokumentis la apartigismon, ankaŭ registris la evoluon de sudafrika ĵazo tra preskaŭ sesdek jaroj.*

La renkonto inter tiu eksterordinare bona fotisto kun memorinda erao kaj vibra kaj revolucia muzik-medio rezultigis riĉan kaj aŭtentan fotografian serion, kiu havas la valoron de historia dokumento.

Deknaŭjara, en 1950, Schadeberg lasis Germanion kaj ĝian nazian pasintecon. Sed la lando, kiun li elektis por instaliĝo, Sudafriko, estis ĵus falinta en plenan apartigismon. En Sophiatown (Johanesburgo) kaj aliaj sudafrikaj getourboj, kien neblankuloj estis ŝovitaj el la urbocentroj, la fotisto miksiĝis kun la juna generacio de nigrohaŭtaj muzikistoj. Plejparte memlernintoj, kun okuloj alkroĉitaj al Manhattan, ili transprenis la muzikan medion per nova kaj distinga stilo. "En Sud-Afriko la usona ĵaz-sono estis adaptita kaj afrikigita, donante al ĝi getourba gusto," Schadeberg klarigis.

Estontaj mondaj ĵaz-steluloj – inter ili Miriam Makeba, Hugh Masekela kaj Abdullah Ibrahim – faris siajn unuajn paŝojn en tiuj laboristaj najbaraĵoj. Pelitaj al ekzilo, ĉefe en Usono kaj Eŭropo, multaj el tiuj muzikistoj plu utiligos sian talenton kaj famon por la lukto kontraŭ apartigismo.

Tiun tempon, tiujn aspirojn, tiun lukton la kamerao de Schadeberg kaptis. Lia laboro kaŭzis plurajn arestojn kaj sendis lin al ekzilo en 1964. Konsiderata kiel la patro de la sudafrika fotografio, Schadeberg – kiu fariĝis direktoro de la nigrurba kulturmagazino *Drum* – trejnis tutan generacion de sudafrikaj fotoĵurnalistoj en la 1950-aj.

"Muziko, kaj ĵazo aparte, estas internacia lingvo, kiu reprezentas liberecon pro sia origino – elkreski el sklaveco," diris Herbie Hancock, ĵaz-legendo kaj la iniciatinto de la Internacia Ĵaz-Tago, en speciala eldono de la Kuriero en 2012. Deklarita de UNESKO en 2011, tiu tago, ĉiujare en la 30-a de Aprilo, celebras la universalajn valorojn de ĵazo – kiu ekestis en la sudo de Usono en la antaŭjaroj de la dudeka jarcento.

** Ĵazo, Bluso kaj Svingo: Ses Jardekoj da Muziko en Sudafriko). Fotaĵoj faritaj de Jürgen Schadeberg, kun eseoj verkitaj de Don Albert, Gwen Ansell, Darius Brubeck kaj Hotep Idris Galeta. Claremont, David Philip Publishers, 2007.*

*__Antaŭa paĝo:__ Ankoraŭ adoleskanto en 1954, Hugh Masekela, kiu poste fariĝis internacie konata, esploras trumpeton donacitan al li de la ĵaz-legendo Louis Armstrong, sub la rigardoj de liaj kunuloj el Huddleston Jazz Band.*



*➲Todd Matshikiza, pianisto, verkisto kaj muzik-kritikisto por Drum, la ĉefa magazino por nigra urba kulturo, fotita en 1952. Li ankaŭ komponis la muzikon por King Kong, la unua "nigra" ĵaz-opero de Sud-Afriko.*



*➲ Kippie Moeketsi en 1951. Unu el la plej grandaj ĵaz-muzikistoj aperintaj el Sud-Afriko, la saksofonisto decidis resti en sia lando post la masakro en Sharpeville en 1960 – male ol multaj aliaj muzikistoj, kiuj iris en ekzilon .*

*➲ Miriam Makeba, internacie konata ĵaz-kantistino kaj ikono de la lukto kontraŭ rasapartigo, en registrad-studio de Johanesburgo, 1955.*


TRUTONE
TROPIK D-C
Jambo records
TROPIK D-C
Envee
TRUTONE
QUALITY
COLUMBIA
HIS MASTER'S VOICE
Hi-note
BB records
QUALITY
Envee
TRUTONE
COLUMBIA
Envee
TRUTONE



*General Duze, la legenda ĵaz-gitaristo, kiu ludis kun la ĉefaj sudafrikaj ĵaz-bandoj, fotita kun siaj infanoj en la getourbo George Goch, Johanesburgo, 1951.*



*Brila saksofonisto, Mackay Davashe (fotita en 1952) estis unu el la plej kreivaj komponistoj kaj bandestroj de sia epoko. Lia komponaĵo Lakutshon Ilanga, kiu trairis tempon kaj landlimojn, famiĝis pere de Miriam Makeba en la fino de la 1950-aj.*





Klakdancado ĉe Ritz, laŭmoda klubo en la centro de Johanesburgo, 1952.

El Orlando al Sophiatown al Mamelodi, Pretorio, improvizitaj dancejoj ĉie furoris en sudafrikaj getourboj, 1951.









*Pianisto kaj muzika ikono Abdullah Ibrahim fondis la plejgrandan sudafrikan bibopan bandon, la Jazz Epistles, en 1959. En tiu ĉi foto, farita en 1979, li ludas en la edziĝo de amiko en Novjorko, kie li ekziliĝis en la 1960-aj jaroj.*

**Paĝoj 36-37:** *Anoj de la legenda sesopo Blue Notes, trumpetisto kaj flutisto Mongezi Feza kaj saksofona majstro Dudu Pukwana improvizantaj en fumoplena subteretaĝa klubo en Hillbrow, distrikto de Johanesburgo, 1962.*



*Ĵaz-diino kaj komponisto Gloria Bosman, fotita en 2001. Ŝi studis operon ĉe Pretoria Technikon kaj estas unu el la vizaĝoj de nova generacio de sudafrikaj ĵaz-muzikistoj.*

*En 1998, The Divas – Abigail Kubeka, Thandi Klaasen, Dolly Rathebe kaj Mara Louw – kantis klasikan ĵazon kaj bluson el la 1950-aj dum omaĝo al Sophiatown. La getourbo, en la antaŭurbo de Johanesburgo, estis detruita de la reĝimo en 1955.*

# IDEOJ

"Sistema rasismo estas fondita sur la malvalorigo de iuj minoritataj grupoj, historie konsiderataj subuloj"

# Rasismo:

## Alfrontante la nepripenseblon

**La polica brutaleco, priatentigita en Usono printempe 2020, kaŭzis ondon de protestoj, kiuj etendiĝis signife eĉ ekster la landlimoj. Rasismo, ĉu sistema, ĉu "ordinara", restas profunde enradikiĝita en la mensoj kaj en la funkciado de la nuntempaj socioj, la aŭtoro argumentas.**

**Véronique Tadjo**

Verkisto, akademiano kaj artisto, kiu naskiĝis en Parizo kaj kreskis en sia hejma Eburbordo, Tadjo estas la aŭtoro de pluraj libroj, inkluzive de For de Mia Patro, ŝia plej freŝa romano. Ŝi nun dividas sian tempon inter Londono kaj Abidjano.

Bildoj de George Floyd, mankatenita viro sufokita kaj mortigita de policano en Minneapolis la 25an de majo 2020 – afiŝita en la interreto kaj poste disvastigita de la internaciaj amaskomunikiloj – kreis tutmondajn protestojn kaj alportis la problemon pri rasismo reen al la lumo.

Dum iom da tempo, ni eble nutris la iluzion, ke ni vivas en postrasisma erao. La elektoj de Nelson Mandela kiel la unua nigrohaŭta prezidento de Sudafriko en 1994 (ĝis 1999) kaj de Barack Obama, la unua nigrohaŭta ŝtatestro de la Usono en 2008 (kiu servis kiel prezidento de 2009 ĝis 2017) estis ŝlosilaj momentoj kiuj kontribuis al ĉi tiu sento. Simila optimismo regis en Francio, kie respublikanaj valoroj ŝajne superis la nocion de raso, kiu ŝajnis ekstermoda.

Tamen "ordinara" rasismo neniam ĉesis trapenetri nian ĉiutagan vivon, nutrante prijuĝojn kaj antaŭkonceptojn. Foje subtila, ofte fronte, ĝi ripozas sur tri kolonoj, laŭ franca genetikisto, antropologo kaj etnobiologo Évelyne Heyer kaj historiisto Carole Reynaud-Paligot, kiu laboris pri ekspozicio (2017-2018) en la Muzeo de Homaro *(Museum of Mankind)* en Parizo.

Tiuj kolonoj estas: "Klasifiki individuojn en grupoj (reflekso de la homa cerbo, sed klasifikaj kriterioj varias laŭ socihistoriaj kuntekstoj), prioritato (iuj estas taksataj aŭ malplivalorigitaj pro arbitraj kialoj) kaj esencigi ilin, aŭ prezenti ĉi tiujn diferencojn kiel estante nevenkeblaj, neeviteblaj, ĉar ili estas heredataj."

## Malakcepto de la aliulo

Ĉi tiu malakcepto de la aliulo havas diversajn formojn. Eĉ manifestiĝas en kazo de famaj personecoj, kiel ekzemple negativa opinio pri nigrohaŭta piedpilkisto aŭ publikigo de negativaj opinioj en sociaj retoj kontraŭ nigrohaŭtaj politikistoj.

Sed plej ofte simplaj civitanoj suferas pro ilia rasa origino dum serĉado de loĝejo aŭ dungado. Tia diskriminacio sinteno estas ĝenerale malakceptita de la granda publiko. Rekonita kiel malutila por socia

"Tamen ordinara rasismo neniam ĉesis trapenetri nian ĉiutagan vivon, nutrante prijuĝojn kaj antaŭkonceptojn"



CC BY 2.0 photo by Tony Webster

*Grupo de protestuloj en Minesota proteste faligis teren la statuon de la itala esploristo Kristoforo Kolombo, en junio 2020. Ĝi estis unu el pluraj statuoj asociitaj al sklaveco kaj koloniigo, detruitaj dum tutlandaj manifestacioj en Usono.*

kohereco, prave aŭ ne, ĝi estas atribuita al reakcia pensado.

Laŭ la psikiatro kaj filozofo Frantz Fanon, granda advokato, gvidanto de la luktoj por malkoloniigo, "rasismo ne estas la tuto sed la plej videbla elemento, la plej ĉiutaga, por esti honesta, en iuj tempoj, la plej kruda de difinita strukturo".

Ni nomas ĉi tiun ekzistantan strukturon "sistema rasismo". Pli domaĝa kaj pli malfacile videbla, ĝi aktivas kaŝe eĉ en la ŝtataj departamentoj. Por tiuj, kiuj neniam alfrontis similajn eventojn, estas facile nei ĝian ekziston. Ĉu ne ekzistas leĝoj kiuj kondamnas la diversajn formojn de diskriminacio? En Francio, la unua nacia leĝo kontraŭ rasismo datiĝas de la 1a de januaro 1972 kaj bezonis esti amendita kaj plibonigita plurfoje. Aldone, ekzistas kelkaj eŭropaj kaj internaciaj konvencioj, kiuj povas esti uzataj kontraŭ rasismo. Sed nur leĝoj ne sufiĉas por bremsi ĉiutagan diskriminacion. Necesas fari multe pli ol tio.




*Protestuloj marŝas en julio 2020 memore al la kvara datreveno de la morto de Philando Kastilio, kiu estis mortpafita ĉe trafika halto de polico en Minesota, Usono, la 6an de julio 2016.*

© Patience Zalanga

## Sistema rasismo

Ni ne povas kompreni la amplekson de sistema rasismo se ni reduktas ĝin al izolitaj agoj. Sistema rasismo estas fondita sur la malvalorigo de iuj minoritataj grupoj historie konsiderataj subuloj pro la heredaĵo de sklaveco kaj/aŭ koloniigo. En tiel nomata demokratia socio, la sistema rasismo penetras la leĝan sistemon (rasa profilo kaj polica perforto), la malliberejan sistemon (pli alta nombro de malliberuloj kaj pli pezaj punoj), la edukan sistemon (malsukcesa lernado), la sansistemon (limigita aliro al kuracado), la labormedion (pli alta procento de senlaboreco) kaj socian moveblecon (laboristaj domoj kaj najbaroj) – ĉi listo ne estas kompleta.

Por la historiisto Laure Murat, profesoro pri literaturo ĉe la Universitato de Kalifornio en Los-Anĝeleso (UKLA), sistema rasismo estas "institucia monopolo kiu, plej ofte, daŭrigas tipon de kulturo, kiu estas seksisma, rasisma, perfortema".

La manifestacioj, kiuj spontanee okazis tutmonde kaj subtene al la usona movado Nigraj Vivoj Gravas *(Black Lives Matter)*, estas la esprimo de konsciigo de la multflanka naturo de rasismo – kiu malfermas la vojon al diversaj specoj de diskriminacio (antisemitismo, islamofobio, homofobio, seksismo, transfobio, ktp.). La kunteksto de la pandemio ligita al KOVIM-19, kreante la kolektivan sperton de socia distancigo, de sufero kaj morto, sendube pligrandigis la publikan konscion pri ĉi tiu tragedio.

Nigraj Vivoj Gravas estas parto de la historia lukto de nigrohaŭtaj usonanoj por rasa egaleco, ekde la komenco de sklaveco en la plantejoj de la sudo de Usono en la deksepa jarcento ĝis la batalo por civilaj rajtoj en la 1960-aj jaroj, kiu finigis apartigon en publikaj lokoj, transportado kaj la eduka sistemo.

Ĉi tiu movado ĉerpas sian forton el la luktoj kaj pasintaj venkoj, eĉ se ili ne ebligis elradikigon de rasismo en la usona socio. Sed estas rimarkinde kompreni, ke tiu movado sukcesis mobilizi la amasojn ĉirkaŭ la ideo de internaciiĝo de socia maljusteco. Ĉu en Francio, Britio, Germanio, Aŭstralio aŭ eĉ Sudafriko, la denuncoj kontraŭ polica perforto kaj aliaj formoj de diskriminacio multiĝis kaj generis kolektivan malakcepton de subpremo, humiligo kaj dominado.

## Rezisto al ŝanĝo

Ĉiukaze rezisto al ŝanĝo estas atendata. Afiŝoj kun kontraŭrasismaj sloganoj, grandaj komercaj entreprenoj prezentas pli ofte siajn inkluzivigajn reklamojn kaj librejoj hastas proponi verkojn de nigrohaŭtaj aŭtoroj kaj librojn pri rasismo. Tio montras ke ŝanĝo eblas.

Konsiderante la kaŭzitan materian damaĝon dum multaj el tiuj manifestacioj kaj timo pri publika malordo, subteno por kontraŭrasismo povus malaperi iom post iom – kaj krei okazon por bataloj inter malamikaj grupoj, al defioj al la nuna situacio aŭ al perfortaj kolizioj kontraŭ la polico.

En tiu kunteksto la faligo de statuoj pri racismo jam estas punkto de disputo. La fakto, ke Nigraj Vivoj Gravas ne havas veran centron, estas bremso. Oni rimarkas, ke la movado disiĝis kaj luktas por regi la ekstremismon de tre aktiva malplimulto de aktivuloj.

Por ŝanĝi la socion, la impeto de solidareco devas preterpasi protestojn kaj simbolojn. "Sed se ne estus 'malsamecoj' kaj se ĉiuj estus ĉiam plene konsentaj pri ĉio, ni ne bezonus demokration", kiel memorigas nin Jan-Werner Müller, profesoro pri politiko ĉe la Universitato Princeton (Usono), en artikolo publikigita en la franca taĝjurnalo *Libération* la 30-an de junio 2020. "Demokratio signifas reguligadon de konfliktoj (per la Konstitucioj kaj, precipe, per la fundamentaj rajtoj). En demokratio, unuanimeco ne estas valoro en si mem." Kontraŭbatali rasismon ne signifas helpi nigrohaŭtulojn, sed krei socion bazitan en ŝancegaleco kaj respekto al diferencoj.

***El la angla esperantigis Ursula Grattapaglia (Brazilo)***

# NIAJ GASTOJ

## Aude Bernheim kaj Flora Vincent

**Biologoj ĉe la Weizmann-Instituto de Scienco en Israelo, ili estas la fondintoj de *WAX Science*, asocio, kiu antaŭenigas seksan egalecon en la scienco.**



# "Ni devas eduki algoritmojn"



© François le Loup

**Seksismaj algoritmoj? La demando eble ŝajnas stranga. Koditaj de homoj, la algoritmoj uzataj de artefarita intelekto ne estas liberaj de stereotipoj. Sed kvankam ili povas estigi seksismajn aŭ rasismajn antaŭjuĝojn, ili ankaŭ povas esti uzataj por antaŭenigi seksan egalecon. Jen kion montras Aude Bernheim kaj Flora Vincent en sia libro Artefarita Intelekto, Ne Sen Virinoj! (*L'Intelligence artificielle, pas sans elles!*).**

**Intervjuita de Agnès Bardon**

UNESKO

● ***Kiel vi interesiĝis pri la genra problemo en artefarita intelekto (AI)?***

**Aude Bernheim:** Origine nia pensado fokusiĝis al ligoj inter seksa egaleco kaj scienco. En 2013, ni fondis la asocion *WAX Science*, aŭ *WAX* (Kio pri Spertado de Scienco), por ekzameni kiel la manko de seksa diverseco en sciencaj esploraj teamoj eble povus influi la produktojn de scienco kaj teknologio. Nia laboro pri AI fontas el ĉi tiu pripensado.

Fakte, ni ne vere miris trovi seksajn antaŭjuĝojn en ĉi tiuj teknologioj, ĉar ili ekzistas en multaj aliaj kampoj. Ne estis kialo por ke AI evitu ilin. Sed la konsekvencoj estas multaj, kaj superas la kutimajn aferojn de profesia egaleco aŭ salajroj. La stereotipoj ene de la algoritmoj povas havi negativan efikon sur la maniero ekzameni laborpostulojn – ekskludante virinojn de teknikaj postenoj – salajroproponojn, kaj eĉ medicinajn diagnozojn.

**Flora Vincent:** Al sciencaj teamoj mankas diverseco – tiu fenomeno estas konata. Kio ne estas tiel konata, ke tio havas konsekvencojn pri kiel disvolviĝas esploroj kaj pri kiaj temoj prioritatas. Usona scienca historiistino, Londa Schiebinger, esploras pri ĉi tiu temo. Ŝi montras, ke ju pli multaj virinoj estas en teamo, des pli probable estas konsiderata la genra problemo en la studo mem.

Ekzistas multaj ekzemploj de ĉi tiu diskriminacio en esplorado. Unu ekzemplo estas, ke drogoj estas pli ofte provataj al viraj ratoj, ĉar ili havas malpli da

hormonoj, do oni konsideras pli facile mezuri kromefikojn. Alia ekzemplo: por kolizitestoj, normaj 1,70-metraj kaj sepdek-kilogramaj imitaĵoj, laŭ la averaĝa grandeco kaj konstruo de viroj, estas uzataj. Rezulte, la sekurzono ne konsideras iujn situaciojn, kiel ekzemple gravedaj virinoj.

● ***Ĉu komputiko estas fako regata de viroj dekomence?***

**Bernheim:** Ne, tio ne estis ĉiam tiel. Komence de la 20-a jarcento, komputiko estis fako, kiu postulis multajn sufiĉe tedajn kalkulojn. Tiutempe, ilin ofte faris virinoj. Kiam aperis la unuaj komputiloj, virinoj estis avangardo. Tia laboro tiam ne estis konsiderata kiel prestiĝa. En 1984, tridek sep elcentoj el tiuj dungitoj en la komputila industrio en Usono estis virinoj. Kompare, en Francio en 2018, nur dek elcentoj de la studentoj pri komputiko kursoj estis virinoj; oni kalkulas, ke nur dek du elcentoj de la studentoj pri AI estas virinoj.

Fakte grava ŝanĝo okazis en la 1980-aj jaroj, post la ekapero de la persona komputilo. De tiam komputada teknologio atingis senprecedencan ekonomian gravecon. La distra uzo de komputiloj ankaŭ aperis en tiuj jaroj, disvolvante tre virecan kulturan bildon ĉirkaŭ la figuro de giko. Ĉi tiu duobla tendenco estis akompanata de marĝenigo de virinoj. Ĉi tio montras, ke la emo de knaboj al komputiloj ne estas natura, sed ke ĝi estas ĉefe kultura kaj konstruita.

● ***Oni kredas, ke algoritmoj estas esence neŭtralaj. Kiom multe ili kontribuas al la reprodukto de seksaj specifaj antaŭjuĝoj?***

**Bernheim:** Iuj malkaŝantoj sufiĉe rapide rimarkis, ke algoritmoj antaŭjuĝas. Ili trovis, ekzemple, ke tradukilo (en la francan, kiu havas virajn kaj virinajn substantivojn) emis doni sekson al profesioj tradukitaj, el la angla "the doctor" (kuracisto) al "le docteur" (vira), kaj "the nurse" (flegistino) al "l'infirmière" (ina). Kiam aperis voĉaj helpantoj – ĉu Alexa, Siri aŭ Cortana – ili ĉiuj havis inajn nomojn kaj respondis al ordonoj sufiĉe submetiĝeme, eĉ kiam ili estis insultitaj (vidu sekvan paĝon).

En 2016, Joy Buolamwini, afrikdevena usona esploristino ĉe *Massachusetts Institute of Technology (MIT)*, interesiĝis pri vizaĝarekonaj algoritmoj. Ŝia laboro montris, ke ili (la AI) estis trejnitaj per datumbazoj, kiuj enhavis plejparte fotojn de blankaj viroj. Rezulte, ili multe malpli efikis pri rekonado de nigrulinoj aŭ aziaj viroj, ol blankuloj. Vi povas imagi, ke se ŝi estus parto de la teamo, kiu disvolvis ĉi tiujn algoritmojn, la situacio estus alia.

**Vincent:** Kodigi algoritmon estas kiel skribi tekston. Estas iom da subjektiveco, kiu manifestiĝas en la elekto de vortoj, en la maniero diri ion - eĉ se ni havas la impreson, ke ni verkas tre faktan tekston. Por identigi la antaŭjuĝojn, nia aliro konsistis el dispartigo de la malsamaj stadioj de tio, kion ni nomas „seksisma kontaĝo". Tiel estas, ĉar ne ekzistas sola kaŭzo, kiu kreas antaŭjuĝan algoritmon, ĝi rezultas de ĉeno de kaŭzeco, kiu intervenas ĉe la malsamaj stadioj de ĝia konstruado.

Se la homoj, kiuj kodas, testas, regas kaj uzas algoritmon, ne konscias pri ĉi tiuj eblaj antaŭjuĝoj, ili reproduktos ilin. En la vasta plimulto de kazoj, ekzistas neniu konscia intenco diskriminacii. Plej ofte ni simple reproduktas senkonsciajn stereotipojn, kiuj evoluis dum nia vivo kaj edukado.

● ***Ekzistas konscio pri la antaŭjuĝo en iuj AI-produktoj hodiaŭ?***

**Bernheim:** Ĉio en AI-fako evoluas tre rapide – la teknologio mem, sed ankaŭ la pensado pri ĝia uzado. Kompare kun aliaj fakoj, la problemo de diskriminacio aperis tre frue. Apenaŭ tri jarojn post la komenco de algoritma febro, malkaŝantoj komencis atentigi pri la diferencigita traktado de iuj algoritmoj. Ĉi tio jam estas aparta fako en la scienca komunumo. Ĝi instigis multajn debatojn kaj kondukis al esplorlaboro pri la detekto de antaŭjuĝo kaj la implicoj de algoritmoj laŭ etika, matematika kaj komputika vidpunktoj. Ĉi tiu konscio ankaŭ eĥis en la ĉefaj amaskomunikiloj. Ne ĉiuj problemoj estis solvitaj, sed ili estis identigitaj kaj post kiam oni trovu solvon, eblos ĝin efektivigi.

● ***Kiel povas algoritmoj fariĝi pli egalismaj?***

**Bernheim:** Unue ni devas agi je la datumbaza nivelo, por ke ili reprezentu la loĝantaron en ĝia tuta diverseco. Iuj kompanioj jam faras tion kaj laboras pri datumbazoj, kiuj konsideras diferencojn pri sekso, nacieco aŭ morfologio. Rezulte de laboro publikigita pri la mankoj en vizaĝrekona programaro, iuj kompanioj retrejnis siajn algoritmojn por esti pli inkluzivigaj. Ankaŭ aperis kompanioj, kiuj specialiĝas pri disvolvado de iloj por taksi algoritmojn kaj prijuĝi ĉu ili estas partiaj.



© François le Loup

## Voĉaj helpantoj: Programoj, kiuj plifortigas seksan antaŭjuĝon

"Mi ruĝiĝus se mi povus": dum jaroj, tiel reagis *Siri*, la voĉ-reaga asistanto de *Apple*, al seksa insulto. Ĉi tiu nekohera respondo estis la inspiro por la titolo de "Mi ruĝiĝus, se mi povus" publikaĵo de UNESKO, kiu ekzamenas la efikon de seksa antaŭjuĝo sur la plej oftaj aplikoj de artefarita intelekto, kiel voĉaj asistantoj.

Plej multaj voĉaj helpantoj, kiel *Siri*, Alexa de *Amazon* kaj Cortana de *Microsoft*, havas virinajn nomojn kaj voĉojn, kaj obeeman "personecon". Ĉi tiuj maŝinoj, kiuj invadis nian ĉiutagan vivon, esprimas submetiĝemon, kiu ilustras la seksan antaŭjuĝon en iuj AI-aplikoj.

Ĉi tio neniun surprizas, ĉar la fakaj teamoj, kiuj disvolvas ĉi tiujn avangardajn teknologiojn, konsistas ĉefe el viroj. Tutmonde, nur dek du procentoj de AI-esploristoj hodiaŭ estas virinoj. Ili konsistas el nur ses procentoj de softvaraj programistoj kaj registras dek tri fojojn malpli da patentoj pri Informaj kaj Komunikaj Teknologioj (IKT) ol iliaj viraj kolegoj.

Por superi ĉi tiujn antaŭjuĝojn, la UNESKO-eldonaĵo faras serion da rekomendoj. Precipe ĝi rekomendas ĉesigi la praktikon doni al voĉaj helpantoj inan voĉon kiel normo, kaj programi ilin por malinstigi la uzon de seksismaj insultoj. Aparte, la eldonaĵo emfazas la bezonon doni al knabinoj kaj virinoj la teknikajn kapablojn por disvolvi novajn teknologiojn en egaleco kun viroj.

En ĉi tiu areo statistikoj foje kontraŭdiras rezonadon. La landoj plej proksimaj al atingo de seksa egaleco, precipe en Eŭropo, havas la plej malaltajn kvotojn de virinoj dungitaj en la teknologia sektoro. Male, iuj landoj kun malaltaj niveloj de seksa egaleco havas altajn procentojn de virinoj diplomiĝintaj pri novaj teknologioj.

Ekzemple en Belgio nur ses procentoj de diplomiĝintoj pri IKT estas virinoj, kontraŭ kvindek ok procentoj en Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj. Tial la bezono – insistas la aŭtoroj de la eldonaĵo – adopti rimedojn por ĉie kuraĝigi la ĉeeston de virinoj en cifereca edukado.

Lanĉita en majo 2019, "Mi ruĝiĝus se mi povus" estis produktita kunlabore kun la germana Federacia Ministerio pri Ekonomia Kunlaboro kaj Disvolviĝo kaj kun Koalicio pri Egalkapabloj, tutmonda partnereco de registaroj kaj organizoj, kiu antaŭenigas seksan ekvilibron en la teknologia sektoro.

*El la angla esperantigis Jens Spillner (Germanio)*

**Vincent:** Samtempe, en la scienca kaj esplora komunumoj, oni pensis pri kiel efektivigi pli sendependan taksadon, kaj pri la bezono de algoritma travidebleco. Iuj fakuloj, kiel Buolamwini, rekomendas la disvolviĝon kaj ĝeneraligon de inkluzivigi kodo, samkiel ekzistas por inkluzivigi verkadon.

Inter la ekzistantaj iniciatoj ni menciu ankaŭ la laboron de la kolektivo Datumoj por la Bono *(Data for Good)*, kiu celas igi algoritmojn servi la ĝeneralan intereson. Ĉi tiu kolektivo redaktis etikan ĉarton nomitan "Hipokrata ĵuro por datum-sciencistoj", kun listo de tre konkretaj parametroj kontrolotaj antaŭ ol efektivigi algoritmon, por certigi, ke ĝi ne estas diskriminacia. Gravas subteni tian iniciaton.

● ***Ĉu AI povas fariĝi modelo por kontraŭbatalo al antaŭjuĝo?***

**Bernheim:** Jusence jes, en tiu senso, ke ni ekkonsciis sufiĉe rapide pri la antaŭjuĝoj, kiujn tiuj ĉi novaj teknologioj povus estigi. AI estas en la procezo revolucii niajn sociojn, do ĝi ankaŭ povas igi aferojn evolui pozitive. AI ebligas administri kaj analizi tre grandajn kvantojn de datumoj. Ĝi ebligis al *Google*, precipe, krei algoritmon en 2016 por kvantigi la parolotempon de virinoj en ĉefaj usonaj filmoj kaj montri ilian subreprezentadon. Samtempe ankaŭ la teamoj, kiuj disvolvas algoritmojn,

> Kodigi algoritmon estas kiel skribi tekston. Estas iom da subjektiveco, kiu manifestiĝas en la elekto de vortoj

devas esti pli genre ekvilibrigitaj. Hodiaŭ, tamen, pro kelkaj kialoj – inkluzive de la memcenzuro de knabinoj kiam temas pri sciencaj kampoj, kaj la seksismo reganta en altteknologiaj kompanioj – tre malmultaj virinoj studas komputikon. Necesos tempo por renversi ĉi tiun tendencon.

**Vincent:** Kompreneble, la algoritmoj devas esti edukitaj, sed ŝanĝi kelkajn liniojn de kodo ne sufiĉas por solvi la problemojn. Ni devas memori, ke ne estos volo kodigi egalecon, se la implikitaj teamoj ne inkluzivus virinojn.

*El la angla esperantigis Jens Spillner (Germanio)*

# MAPANTE



© Ammar Abd Rabbo/ABACAPRESS.COM

# Bejruto: Rekonstruante la estontecon per edukado kaj kulturo



CC BY-SA 4.0 photo by Edeyrn87

La Palaco Sursock, familia loĝejo en historia distrikto de Bejruto nomita Achrafieh, fotita en junio 2020, antaŭ la eksplodoj

La 160-jara Palaco Sursock kaj la Muzeo Sursock antaŭ ĝi, ambaŭ kun riĉaj artaj kolektoj. La konstruaĵoj estas serioze damaĝitaj de la eksplodoj.

**Mila Ibrahimova**

UNESKO

Jam surreliĝante post la ekonomia krizo kaj la tergloba pandemio, Bejruto estis skuita de du mortigaj ekspodoj en la 4-a de Aŭgusto 2020. La eksplodoj forprenis proksimume 200 vivojn, lasis milojn da vunditoj kaj ruinigis vastan areon en la koro de la libana ĉefurbo.

Por helpi la urban restarigon, UNESKO lanĉis Li Beirut (Por Bejruto, en la araba) la 27-an de Aŭgusto 2020, internacia monkolekta alvoko por subteni la revigligon de lernejoj, historiaj konstruaĵoj, muzeoj kaj galerioj.

Laŭ frua listigo de la damaĝoj, almenaŭ 8 mil konstruaĵoj estis atingitaj. Tio inkluzivas 640 historiajn konstruaĵojn, el kiuj sesdeko riskas disfali. La Muzeo Sursock, la Arkeologia Muzeo de la Usona Universitato de Bejruto kaj la historiaj ĉirkaŭaĵoj de Gemmayzeh kaj Mar Mikhaël estis serioze damaĝitaj. La galerio Marfa pri nuntempa arto kaj galerio Tanil estis tute detruitaj. Aldone, kulturaj institucioj spertas signifajn perdojn en enspezoj. Laŭ frua takso, 500 milionoj da usonaj dolaroj estos necesaj por subteni la heredaĵon kaj la kreivan ekonomion en la venonta jaro.

En la eduka fronto, 163 publikaj kaj privataj lernejoj en kaj ĉirkaŭ Bejruto estis damaĝitaj de la eksplodoj – kio povus senigi pli ol 85 mil lernantojn de ilia rajto al edukado. Kvin teknikaj kaj metiaj instalaĵoj, kio inkluzivas dudek lernejojn kaj institutojn pri TMET (Teknika kaj Metia Edukado kaj Trejniĝo), same estis damaĝitaj.

UNESKO, kiu kunordigas la agadon de Unuiĝintaj Nacioj por edukado en Bejruto, gvidas la klopodojn de partneroj kaj donacintoj por revigligi lernejojn kaj certigi, ke lernado neniam ĉesu. La organizo konsentis, ke 40 el la 163 lernejoj atingitaj estu tuj rekonstruitaj per la monrimedoj jam kolektitaj. Oni taksas, ke 23 milionoj da usonaj dolaroj estos necesaj por subteni edukadon.

*El la angla esperantigis James Rezende Piton (Brazilo)*

# Lernejoj

Fonto: UNESKO



**163 lernejoj damaĝitaj aŭ detruitaj**

**85 000 lernantoj senigitaj je lernado**

*Publika lernejo en la bejruta distrikto Achrafieh, unu el la 163 lernejoj damaĝitaj de la eksplodoj.*

© UNESCO / Fouad Choufany



**23 milionoj da USD necesaj por subteni edukadon**

*École des Trois Docteurs, lernejo en la distrikto Gemmayzeh, damaĝita de la eksplodoj.*

© UNESCO / Fouad Choufany

**UNESKO, kiu kunordigas la revigligon de lernejoj, promesis tuj revigligi 40 el la 163 trafitaj lernejoj.**

Fonto: UNESKO



**8 000** konstruaĵoj damaĝitaj

**640** historiaj konstruaĵoj atingitaj

Oni kontrolas la damaĝon kaŭzitan de la eksplodoj en la kvartalo Mar Mikhaël la 13-an de Aŭgusto 2020.

© Bilal Jawich/Xinhua/Newscom/ABACAPRESS.COM




**60** el ili riskas disfali

**500 milionoj da USD** necesaj por subteni la heredaĵon kaj la kreivan ekonomion

**Donacu al Li Beirut**

Galerio Tanit, pri nuntempa arto, fotita du tagojn post la eksplodoj.

© Roy Dib / Ĝentileco de Galerie Tanit

# Novaj Eldonaĵoj




## Mondaj Heredaĵoj n-ro 95

**Interpreto kaj KOVIM-19**


ISSN 1020-4202 EAN 3059630101950

68 pp., 220 x 280 mm, poŝlibro, €7,50

UNESKO-Eldonejo / Publishing for Development Ltd.

La jaro 2020 komenciĝis per senprecedenca sankrizo kiu influis nin ĉiuj. Neeviteble, mondaj heredaĵoj ankaŭ suferis. La subita halto en vojaĝoj kaj turismo ĉesigis la alvenon de vizitantoj kaj la enspezojn alportotajn de ili. Por iuj lokoj, turismo estas la nura enspezofonto por kovri konservadon, prizorgadon kaj salajrojn.

Malgraŭ tio, iuj pozitivaj aspektoj estis rimarkitaj. En kelkaj lokoj, la ĉesigo de vizitoj kaj trafiko donis ripozon al la naturo, kaj renovigo aŭ restaŭro estis faritaj el kulturaj lokoj. En ĉi tiu numero, estroj rakontas al ni pri siaj spertoj dum ĉi tiuj esceptaj cirkonstancoj.




## Raporto pri Monitorado pri Tutmonda Edukado 2020

**Inkluzivigo kaj Edukado: Ĉiuj Signifas Ĉiujn**

ISBN 978-92-3-100388-2

424 pp, 215 x 280 mm, poŝlibro, €55

UNESKO-Eldonejo

La Raporto 2020 pririgardas sociajn, ekonomiajn kaj kulturajn mekanismojn, kiuj diskriminacias malavantaĝajn infanojn, junulojn kaj plenkreskulojn – tenante ilin ekster edukado aŭ marĝenigitaj en ĝi. Instigitaj de ilia devo efektivigi la rajton al inkluziveca edukado, landoj plivastigas sian rigardon al inkluziveco en edukado kaj metas diversecon en la kerno de siaj edukaj sistemoj. Tamen, la efektivigo de bonintencaj leĝoj kaj politikoj ofte ŝanceliĝas.

Publikigita meze de la krizo pri KOVIM-19 – kiu pligravigis tiujn malegalecojn – la Raporto asertas, ke rezisto al traktado de la bezonoj de ĉiu lernanto estas vera minaco por atingi tutmondajn edukajn celojn.




## Indikilo pri Kulturo | 2030

ISBN 978-92-3-100355-4

110 pp, 210 x 280 mm, PDF

UNESKO-Eldonejo

Elŝutebla ĉe https://unesdoc.unesco.org/

Indikilo pri Kulturo | 2030 estas kadro de laŭtemaj indikiloj por taksi kaj kontroli la progreson de la kontribuo de kulturo al la nacia kaj loka efektivigo de la Celoj por Daŭripova Evoluigo de la Agendo 2030.


Tiu metodo estas disvolvita por helpi landojn kaj urbojn kun tre malsamaj kapabloj rilate al kolektado de datumoj kaj statistikoj pri kulturo. La informoj kolektitaj celas kontribui ne nur por politikoj kaj decidoj, sed ankaŭ por agadoj, kiuj ebligu pli grandajn investojn en kulturo kiel sektoro de agado, kaj pli grandan agnoskon de ĝia transa rolo en aliaj sektoroj.

*publishing.promotion@unesco.org*

# La bronza ĉevalkapo, perdita antaŭ 160 jaroj, revenis al Ĉinio,

kaj ĝi estas la unua grava antikvaĵo reveninta de alia lando al Yuanmingyuan.





中华全国世界语协会成立 70 周年
La 70-a Jubileo de ĈEL
2021
辛丑年
新年吉祥
FELIĈAN NOVJARON
新年快乐
中国报道
EL POPOLA ĈINIO
www.espero.com.cn
ĈEL
Ĉina Esperanto-Ligo
Ĉina Fokuso/China Focus
Ĉina Esperanto-Ligo

# Multaj voĉoj, unu mondo

*UNESKO-Kuriero* aperas en ses oficialaj lingvoj de la Organizo, kaj ankaŭ katalune, Esperante, portugale, kaj koree.



















## Abonu la presitan version

1 jaro (4 numeroj): 27€

2 jaroj (8 numeroj): 54€

Afranko: 8 eŭroj (1 numero)

Por ricevi detalajn informojn kontaktu: lamondo@163.com

**https://en.unesco.org/courier/subscribe**

## Abonu la bitversion

**Ĝi etas 100% SENPAGA**

**La vortoj sur la dorsokovrilo:**
**Kiom da mono kontraŭ la animo de lando?**

**La Justaj Juĝistoj**
**Jan kaj Hubert Van Eyck, 1432**

Tio estas la suba maldekstra panelo de Genta Retablo, nacia trezoro kaj unu el la ĉefaj pentraĵoj de flandra Renesanco. Tiu ĉi esenca parto de ĝi, kiu eble entenas portretojn de Jan kaj Hubert Van Eyck, estis ŝtelita en 1934 kaj neniam retrovita.

**Sciu la veran prezon de arto.**

50-jara lukto kontraŭ ŝakrado de kulturaĵoj.




©KIK-IRPA, Brussels

Know the real price of art.

50 YEARS OF FIGHT
AGAINST ILLICIT TRAFFICKING
OF CULTURAL PROPERTY.

UNESCO

ISSN 2096-9082
CN 10 - 1711/C